

3000–5999 paŝoj – 8 baladoj

& Sagaca knabino:.....	642
& Balado de l' prizono Reading:	651
& Ora koko:	658
& Balado de Virgar:	664
& La Alta Kanto de la Amo:	673
& Uraŝima:	681
& La travestiita muzo:	688
& Jen pavo flugas al sudoriento:	698

& Sagaca knabino:

< Rekante 15 el 29 batoj dufoje por strofo, entute 3132 paŝoj dum 35 minutoj. Hungaran popolfabelon poemigis Julio Baghy (Ĉielarko, 1966). Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo modofita de Brúsajøkils kvæði.>

(#Melodio:

(# Brúsajøkils kvæði: /dodo TiLa LaLa SoFa; LaLa LaSo LaLa; dodo TiLa LaLa SoFa; dodo doTi LaLa;

(#Rekantaĵe: LaaLaLa LaLa SoFa FaFa SoLa; LaaLaLa LaSo FaSo La; LaaLaLa LaLa doorere redo Ti La;)

)×108)+

(&Strofoj:

,&1:

'1 Vivis iam aŭ neniam ; –
diras la fabelo – ; brava, paca
kaj sagaca ; reĝo en kastelo.

(×: &R: **Reĝo li luktas
kontraŭ ogroj klinge ; Estas
la veloj ruĝa silk' ; Drakŝipo
kuras, ludas remiloj inge.)**

Sur si kronon, sub si tronon ;
li ja reĝe havis, ; ĝis limlando
de la lando ; lia leĝo gravis.

(×: &R)

'2 La eskorto en la korto ;
salvon pafis tondre, ;
korteganoj, ĉambelanoj ;
klinis sin demonstre. Ĉiu
gajne zorgoŝajne ; lian gracon
serĉis, ; senripoze verse-proze
; komplimenton verŝis.

'3 Li ne kredis. Lin tre tedis ;
blufo, ŝerco, klaĉo, ; kaj
scivole pensis sole ; pri
sagaco, saĝo. Spriton
provi, saĝon trovi, ; ne nur la
humilon, ; el la oro de l'
trezoro ; faris li – plugilon.

'4 En sunbrilo la plugilo ; por
admiro staris... ; Ĝis nun, sciu,
ja neniu ; tian ilon faris.
Tiel pompe kaj sentrompe ;
reĝo ne projektis! ;
Senmakule, eĉ spegule ; sunon
ĝi reflektis.

'5 Iom ruze sinamuze ; reĝo
jen parolas: ; "Ĉesu psalmi!
Diru al mi, ; kiom ĝi valoras?"
..... La demando tra la lando ;
tien-reen krozis, ; ĉies menso
pro la penso ; viglis, ne
ripozis.

'6 Tuj tre multe, eĉ tumulte ;
grafoj, princoj venis, ; sed
neniu estis, kiu ; trafis kaj
divenis. Ili gapis, kapon
skrapis, ; palpis ĝin, balbutis, ;
fine honte forironte ; ruĝiĝante
mutis,

'7 Sur tronseĝo de la reĝo ;
sakris la parolo: ; "Kia sperto
pri mallerto, ; pri la cerba
molo!Korteganoj,
ĉambelanoj, ; dekorita bando,
; eĉ la princoj el provincoj ;
stultas en la lando!"

'8 Li do tiam vokis sian ; avo-
aĝan sklavon. ; "Fiksu, homo,
via kono ; ĝian valorhavon!"
..... Sin klinante, ĝin palpante ;
montris li humilon: ;
"Kamparanoj en la manoj ;
havas – ferplugilon.

'9 Plugi teron uzas feron ; ĉiu
kamparano; la valoro de l'
laboro: ; ĉiutaga pano. Mi,
simplulo, servutulo, ; penson
kiel havus ; pri la pezo, pri or-
prezo?! ; Certe mi mistrafus".
.....

'10 "Mia vorto – via sorto! ;
Sciu, servutulo, ; sen respondo
por vi mondo ; dronos en
nebulo. Do ekpenu kaj
divenu ; la plugil-valoron! ; Se
ne, voktoj post tri noktoj ;
tranĉos vian kolon".

,&2:

'11 Sur la vojo kun malĝojo ;
kamparano migris; pro la timo
pri la fino ; liaj pensoj nigris.
..... Ĉe vojfino al filino, ; kiam
ŝin renkontis, ; tuj raporte
simplavorte ; ĉion li rakontis.

.....

'12 "Ne cerbumu, pipon fumu,
; poste iru dormi! ; Mi ja
trovos, kiel povos ; ĝustan
solvon formi. Ne lamentu,
ne plu plendu, ; estos bona
fino!" ; Tiel ĉarme kaj
korvarme ; traktis lin filino.

.....

'13 Li cerbumis... Ŝi
mastrumis ; kaj babilis, agis, ;
ĉion orde filinzorge ; por
remigro pakis kaj matene
flustris jene ; antaŭ ol li iris: ;
"Al mi kredu, nur ripetu, ;
kion jam mi diris!"

,&3:

'14 Do zorgplene, iom treme ;
migris li al reĝo. ; Foje-foje li
survoje ; turnis sin al preĝo,
..... sed ĉe l' trono paroltono ;
kaŝis lian dubon ; ke neniu
tion sciu, nun li ĵetas kubon.

.....

'15 "Reĝa brilo de l' plugilo ;
ora, senlabora ; por la pladoj
de l' regatoj ; estas –
senvalora. Pluvo, suno por
la humo ; multe pli valoras, ;
ĉar sen tio ja nenio ; ĝermas,
kreskas, floras".

'16 Tiel saĝa kaj kuraĝa ; estis
la respondo; ĝin primiris, eĉ
admiris, ; la kortega rondo.
Sur tronseĝo mem la reĝo ;
kriis surprizita: ; "Jen tre trafe!
Ci plenprave ; estas vere
sprita".

'17 "Reĝo mia, peko mia ;
pezus al animo... ; Vi eraris...
Ne mi faris ; solvon, sed
filino. Do mi petas, por mi
pledas, ; regu vin kortuŝo: ;
por mesaĝo de la saĝo ; estis
mi nur – buŝo".

'18 La honesto kaj modesto ;
reĝan plaĉon trafis; suvereno
en mieno ; jam indulgon
havis. Li ridetis, flustre
petis ; grafon sur tronŝtupo... ;
Tiu kure kaj rekure ; venis kun
– linstupo.

'19 "Mia vorto – ŝia sorto! ;
Vidu, kamparano, ; jen el
stupo por okupo ; ne pli ol
plenmano. Ŝi ŝpinteksu kaj
ampleksu ; ŝia preta tolo ; tian
grandon, ke ĝi landon ; kovru
kun popolo!"

,&4:

'20 Hejmeniris, ĉion diris ;
patro al filino... ; Li lamentis,
antaŭsentis ; timon pri la fino:
.... "Mi respektas, sed
suspektas, ; reĝo havis febron
; stupdonante ordonante ; fari
la – maleblon".

'21 "Ne cerbumu! Pipon fumu,
; poste iru dormi! ; Solvon
ruzan, eĉ amuzan ; provos mi
elformi. El maleblo fari
eblon ; vanus cerbostreĉo; ne
teksaĵon, sed spritaĵon ; volas
nia reĝo".

'22 Li cerbumis...Ŝi mastrumis
; kaj babilis, agis, ; ĉion orde
filinzorge ; por remigro pakis
.... kaj matene flustris jene ;
antaŭ ol li iris: ; "Al mi kredu,
nur ripetu, ; kion jam mi
diris!"

'&5:

'23 Supre reĝo sur tronseĝo, ;
sube princoj staris, ;
kamparano kun elano ;
riverencon faris... .. Liajn
ĝenon, hezitemon ; reĝo vorte
tondis: ; "Nu, pri ŝpino la
filino ; kion nun respondis?"

.....

'24 "Reĝa Moŝto, mi, la poŝto,
; peras, interpretas: ; la filino
por la ŝpino ; tage nokte
pretas, tolon teksos, ĝi
ampleksos ; grandon – landon
kovri, ; sub la tendo regimento
; povos eĉ manovri... ..

'25 Sed ŝi petas – mi ripetas –
; ilojn vi preparu: ; bobenilon,
radŝpinilon, ; eĉ teksilon faru!
..... Celon trafi volu havi ;
nuran reĝan dignon, ; ĉion
fari, finprepari ; uzu – jen ĉi
lignon!"

'26 Per la mano kamparano ;
montras lignon latan, ; kies
grando, mezurrando ; estis nur
– manplata. Reĝo prenis
kaj komprenis, ; tuj eksplode
ridis: ; "Solvo ĝusta,
miagusta! ; Jen ŝi ree spritis!

.....

'27 Kiu spritas, ja meritas, ; ke
honoru oni; mi deziras, eĉ
sopiras ; ŝin persone koni.
Tial, homo, al la trono ; la
filinon gvidu! ; Miajn gracon
kaj donacon ; la kortego
vidu!"

,&6:

'28 Man-en-mano kamparano ;
kaj filino venis... ; Nia reĝo
sur tronseĝo ; pozis,
gravmienis, sed tuj poste,
eĉ ne moŝte ; digno lin
forlasis, ; kiam paro el
kamparo ; al la trono paŝis.

'29 Ŝiaj ondaj haroj blondaj ;
brilis kiel oro, ; en sereno de l'
mieno ; montris sin pudoro,
..... sur la vango pentris sango
; rozon al lilio, ; ŝia ĉarmo
estis varmo, ; suna harmonio.
.....

'30 Suverene, sed serene ; reĝo
ŝin algestis. ; Je la signo ŝi kun
digno ; paŝis... Patro restis...
..... Dum ŝi iris ĉiu miris: ;
"Belo kaj staturato ; estas rekte
kaj perfekte ; arto el eburo!"
.....

'31 "Kvazaŭ helo el ĉielo ; al
mi nun rigardus ; kaj sur lipoj
du tulipoj ; rubenruĝe arduj"
..... – tiel reĝo sur tronseĝo ;
pensis, miris mute ; kaj pro
ravo iĝis sklavo: ; amblindulo
tute.

'32 Ŝin ekvidi kaj decidi ; estis
nur momento; lin katenis, al ŝi
ĉenis ; fajre brula sento.
Ŝin li svatis, ame flatis, ; tuj
dekretis feston, ; donis ringon,
krondistongon ; kaj reĝinan
veston.

'33 "Ju pli frue, des pli brue ;
sonu la fanfaroj! ; Al ĝojfesto
de l' landestro ; venu la
najbaroj! Ĉiu homo ĝis
mentono ; manĝu, trinku,
dancu, ; eĉ hundvostoj pro la
ostoj ; gaje sin balancu!"
.....

'34 Reĝa Moŝto je la kosto ;
de la propra kaso ; brandon,
vinojn, cent bovinojn ; donis
al amaso. Tiutage kaj
senpage ; ĉiu drinkis, festis, ;
eĉ eskorto sur la korto ;
dormis nur, digestis... ..

'35 "Vin, reĝino, junedzino, ;
ame mi salutas; korfidelon,
orjuvelon ; antaŭ vin mi
ŝutas... .. Tamen sciu, al
neniu ; rajtos vi konsili, ; ĉar
la leĝo de la reĝo ; devus vin –
ekzili".

'36 "Homo faras kaj eraras, ;
mia edzo, reĝo; eble iam
pekos mi jam ; spite al la leĝo.
..... Por okazo, se ukazo ;
pelos min sen pledo, ; rajton
solan, min konsolan, ; havu mi
sen peto.

'37 Por feliĉo en malriĉo ;
vidu, jam mi planas; lasu
preni, kun mi teni, ; kion mi
plej amas". "Mi promesas
kaj permesas, ; portu el palaco
; por vi kio estas io ; kara laŭ
la plaĉo!"

,&7:

'38 Foje estis, ke forestis ;
reĝo kun eskorto... ; Du
najbaroj, etaj caroj, ; venis al
la korto. Pro diskuto, eĉ
disputo ; eĥis la palaco; ili
tedis, solvon petis ; pri milito,
paco.

'39 Sed al ili ja konsili ; nur la
reĝo rajtis, ; kiu fore ĉaslabore
; ie pafis, rajdis. Pro
zorgemo pri problemo ; caroj
petis, tedis... ; Al invado, pro
persvado ; la reĝino cedis.

'40 Forgesante, nepensante ;
pri la sekva puno ; ŝi proponis,
konsildonis ; al la cara kuno:
.... "Ne nur toste vortokoste ;
traktu pri la paco; ĉiutage
ĉiuage ; vivu sen – minaco!
....

'41 Kaj feliĉaj, eĉ tre riĉaj ;
iĝos viaj landoj, ; se obeos
pacon kreos ; kapoj, manoj,
langoj..." Dum la caroj per
la ĉaroj ; iris for tre frate, ; –
kia sorto! – reĝo, korto ;
hemenvenis fate.

'42 Edzon trompi, leĝon rompi
; ŝi ja ne intencis, ; tamen
honte lin renkonte ; ŝi pri peko
pensis. "Dum mi ĉasis,
kion faris ; sola vi, tre kara?" ;
Ŝi kelkvorte diris orde: ; "Mi
konsilis, kara",

'43 Pro la vero la kolero ; en la
reĝo bolis, ; tuj reĝpoze
furioze ; tiel li parolis:
"Via vorto – via sorto! ;
Mankas nun pardono. ; Lasu
tronon, vian kronon, ; iru for
el domo!"

'44 Sian kronon sur la tronon ;
metis ŝi sen vorto; sen lamento
post momento ; iris for tra l'
pordo; sed al reĝo tiu leĝo
; ŝajnis nun maljusto, ; ĉar
ektordis, koron mordis ; io en
la brusto.

'45 Pensis reĝo: "Stulta leĝo, ;
kiu min mem punas... ; Kion
fari? Ja erari ; reĝo ne
rajtumas". Dum lin regis
kaj premegis ; la ĉagreno pike,
; ĉe aranĝo por la manĝo ;
helpis ŝi – mistike...

,&8:

'46 Reĝo sola, senkonsola ;
sidis ĉe la tablo... ; Mankis
sprito, mankis rido, ; ĉarmo
kaj afablo. La regalo kiel
galo ; gustis tre amara, ; ĉar
forestis, ne ĉeestis ; la edzino
kara.

'47 Li nescie trinkis tie ;
dolĉan dormigilon, ; poste
vidis (vane spitis) ; griza
lampobrilon... Pro la vino
de l' reĝino ; li inertis dorme ;
kaj ebrie senkonscie ; ronkis
forte ŝtorme...

,&9:

'48 Ŝi sekrete, tre diskrete ;
veturilon petis, ; reĝon sian,
senkonscian, ; sur ĝin zorge
metis. El la korto tra l'
eskorto ; lin ŝi lerte ŝtelis; la
ĉevalojn inter valojn ; ŝi
senhalte pelis.

'49 Al kabano de kampano ;
kiam ŝi alvenis, ; la dormantan
reĝon vantan ; enen ŝi
tirtrenis, kaj sur maton la
amaton ; metis, kovris, vartis,
; kaj ameme korotreme ; ĝis
vekiĝo gardis.

'50 Ĉe vekiĝo per streĉiĝo ;
brakoj tuŝis trabon ; kaj je
salto plafonalto ; batis lian
kapon... "Lito pajla, sfero
ajla, ; senpargeta planko, ;
argilmuroj, polva puro, ; ĉie
manko... manko...

'51 Kio estas? Kie estas ; mi,
ho, Dio sankta!?" ; "Ĉe la sino
de l' edzino ; sole vin amanta.
.... Vi promesis kaj permesis ;
rajton, la konsolan, ; ke mi
prenu, ĉe mi tenu, ; por mi plej
valoran.

'52 Por mi oro kaj trezoro ;
senvaloraj estas, ; ĉar en koro
vi, sinjoro, ; mia edzo nestas...
.... En reĝeco, geedzeco ;
gravas, mi imagas, ; se
komune ili kune ; por regatoj
agas".

'53 "Edzineto, kolombeto, ;
orjuvelo rara, ; nur vi estos,
ĉiam restos ; por mi la plej
kara! Manon prenu, kun
mi tenu ; povon en palaco;
sprite brilu kaj konsilu ; por
popola paco!

,&10:

'54 Kaj de tiam ili ĉiam ; kune
regis juste; mem parolo de l'
popolo ; tion pruvas ĝuste.
Mi aldonas, ĉar mi konas, ;
kio estas vero: ; ili nune vivas
kune ; nur en la – fabelo.)

& Balado de l' prizono Reading:

< Rekante 26 el 53 batoj por strofo, entute 3843 paŝoj dum 43 minutoj. Verkis Oscar Wilde "In Memoriam C. T. W., kavaleriano en Reĝina kavaleria Gvardio Obiit en Prizono de Ŝia Reĝina Moŝto, Reading, Berkshire, 7. julio 1896". Tradukis L. N. M. Newell (Angla antologio II, Londono 1987). Komponis kaj rekantaĵon verkis Martin Strid (2015). Klarigoj (*): '12 Sada, ĝuanta la doloron de alia, volupte kruela (el la nomo de la markizo de Sade). '15 Kajafaso, ĉefpastro kiu akuzis Jesuon je herezo. '17 Anodino = Ĉio, kio malpliigas doloron, ĉu fizikan ĉu moralan.>

(#Melodio:

<1,5:61> /(La LaTi dore mido La La;La So SolLa Tido La;)× do dore mido reTi La La;La So SolLa Tido La; (#Rekantaĵe: (do dore mifa mire Ti Ti; do doLa TiSo LaFa Mi Mi;)× La LaSo LaTi doTi La La a)
)×63)+

(&Strofoj:

,& Unua parto:

'1 /Ne portis li skarlatan jakon,
; ĉar ruĝa2s sang' kaj vin', ;
kun sang' kaj vino sur la
manoj ; oni surprizis lin ; ĉe l'
lito de la povrulino: ;
murditaS2 amatin'.

(×: **Dancu kviete, vivo bonas**
; kaj ĉiu tago lumon donas ;
ĉar naskis niaj nin patrinoj ;
ploris ni en iliaj sinoj. ;
Ĉiujn atingos fine morto.)

'2 Inter juĝotoj li promenis, ;
vestiĝis li humile; sport-ĉapon
portis li kaj ŝajne, ; li paŝis
kor-trankvile; sed hom'
neniam alrigardis ; la tagon pli
sopire.

'3 Neniam hom' pli triste
gvatis ; el sia kor-malhelo ; la
bluan tendon, kiun nomas ; la
prizonan' ĉielo, ; kaj ĉiun
nubon, kiu drivis ; per bril-
arĝenta velo.

'4 Mi marŝis kun la
turmentatoj ; en rond' de
malespero, ; kaj min
demandis, kia kulpo ; lin tenas
en karceri, ; sed tiam dorse
voĉo flustris, ; "Li dancos sur
aero."

'5 Aĥ, Kristo! tia penso ŝajnis
; ŝanceli prizon-muron, ; kiel
flama kask', ĉielo premis ; al
mia kapo brulon; sed eĉ en
pens-infer', la propran ; ne
sentis mi torturon.

'6 Mi sciis nur, ke hastapaŝe ;
pri hanta pens' li revas, ; kaj
kial li al kruda lumo ; rigardon
tristan levas: ; li murdis la
amatan kozon, ; kaj tial morti
devas.

'7 Sed ĉiu murdas la amatan - ;
ne dubu ties pravon, ; iuj per
ekrigard' amara, ; aliaj falsas
ravon, ; timulo faras ĝin per
kiso, ; bravulo uzas glavon.
.....

'8 En jun' la amatan murdas
iuj, ; aŭ kun senila ploro;
strangolas jen la man' volupta,
; kaj jen la man' de l' oro: ;
ponardon uzas la teneraj, ; ĉar
pasas tuj doloro.

'9 Tro amas iuj, aŭ tro kurte, ;
aĉetas aŭ forvendas; mortigas
iuj kun larmado, ; aliaj ne
lamentas: ; ĉar amon murdas
ĉiu viro - ; sed ĉiu vir' ne
pendas.

'10 Ne trafas lin la malnobla
morto ; en sombra sort-
mateno, ; nek kovras la
vizaĝon tuko, ; ne premas
pend-rimeno, ; nek falas li
pied-antaŭe ; tra planko al
malpleno.

'11 Maten-krepuske lin ne
vekas ; tim-formoj apud lito, ;
ŝerif' minaca, pastr' en stolo, ;
tremanta pro ekscito, ; kaj
Prizonestro palvizaĝa ; pro l'
sorto de Damnito.

'12 Li ne leviĝas haste, nek ;
en honta vest' paradas, ; dum
kuracist' kun sada* buŝo ; ĉiun
nerv-tremon gvatas, ; kun poŝ-
horloĝ' kies tiktako ; sur kor-
amboso batas.

'13 Ne konas li soifon naŭzan,
; kiu la gorgon polvas, ; ĝis
pendigist' kun pezaj gantoj ;
kaŝvenas, kaj lin volvas ; per
tri rimenoj, kaj por ĉiam ; lin
de l' soif' absolvas.

'14 Ne aŭdas li Sepultajn
Preĝojn ; stare kun kap'
klinita, ; kaj dum dolore neas
morton ; lia terur' spirita, ; ne
vidas sian ĉerkon ire ; al la
barako hida.

'15 Ne suprenĝapas li tra vitro
; al la sunluma paco; nek
preĝas per argilaj lipoj ; por
agoni-forpaso; ne tuŝas la
tremantan vangon ; la kis' de
Kajafaso*.

,& Dua parto:

'16 Promenis li dum ses
semajnoj ; vestiĝis li humile;
sport-ĉapon portis li, kaj ŝajne
; li paŝis kor-trankvile; sed
hom' neniam alrigardis ; la
tagon pli sopire.

'17 Li ne marasme tordis
manojn, ; nek ploris vivo-
finon, ; sed trinkis la aeron
kvazaŭ ; sanigan anodinson*;
tra malfermita buŝ' li trinkis ;
la sunon kvazaŭ vinon!

'18 En rond' alia turmentataj ;
ni marŝis sen espero, ; forgesi
ĉu nin ĉenas granda ; aŭ eta
kulp-afero, ; kun stulta miro
pri la viro ; danconta sur aero.
.....

'19 Kun vid-esploro kaj
angoro ; ni gvatis ĉiutage; ĉu
saman vojon iros ĉiu, ;
demandis ni image: ; Ĉar
blinda, al infer' timinda, ; l'
animo iros vage.

'20 Mi kun juĝotoj ne plu vidis
; lin morte apatian, ; ĉar jam
okupis li juĝate ; la benkon
pilorian; kaj en ĉi dolĉa mond'
mi vidos ; ne plu vizaĝon lian.
.....

'21 Kiel en ŝtorm-pere' du
ŝipoj, ; ni pase nin renkontis, ;
sen vanaj vortoj preterdrivis, ;
nenian signon montris, ; ĉar ne
kuniĝis ni dum nokto, ; sed en
la tago hontis.

'22 Prizonaj muroj nin ĉirkaŭis
; parioj en ekzilo; el sia kor' la
hom' nin pelis, ; kaj Di' el
grac-azilo; pro Pek-plenumo,
fera puno ; nin tenis en
kaptilo.

,& Tria parto:

'23 En la prizona korta ŝtona ;
gutas la alta muro; li tien iris,
aeron spiris ; sub la ĉiel-
obskuro; ĉe flank' gardistoj
marŝis, ke ; ne perdu lin la
ŝnuro.

'24 Aŭ se li sidis, tiuj gvatis ;
lian angor-obsedon; kaj gvatis
se li staris plore, ; aŭ kaŭre
preĝis pledon; gvatante, ke li
mem ne rabu ; al eŝafod' la
predon.

'25 Li fumis, kaj bieron
trinkis, ; ĉiutage laŭ kutimo;
animo lia estis firma, ; en ĝi
ne estis timo; li diris, ke li
ĝojas vidi ; pendingon en
proksimo.

'26 Sed ne kuraĝis la Gardistoj
; komenti tiun haston. ; Ĉar
kiu la gardistan sorton ; ricevis
kiel taskon, ; la buŝon ŝlosas,
kaj li faras ; el la vizaĝo
maskon.

'27 Ni flustre grumblis dum ni
stumblis ; en la Pajac-Parado!
; Al ni egalas: ni lojalis ; al la
Satan-Brigado: ; Piedoj
plumbaj, haroj stumpaj - ; jen
gaja maskerado.

'28 Disŝire gudroŝnuro kaŭzis
; sub ungoj sangoŝvelojn; ni
frotis ŝrankojn, skrapis
stangojn, ; kaj brosis la
kahelojn; ni ŝmiris sapon sur
plank-trabon, ; frapante la
sitelojn.

'29 Ni sakojn stebis, kaj
martele ; la rokojn ni
dissplitis; ni ladon bekis,
himnojn blekis, ; kaj sur paŝ-
rado ŝvitis; sed en la kor' de
ĉiu homo ; silente Tim' insidis.
.....

'30 Silente: ĉiu tag' forrampis ;
kiel algpeza hulo; forgesis
faton senkompatan ; fripon'
kaj malsaĝulo; ĝis foje ni
ekvidis tombon ; gapantan sub
okulo.

'31 Ĉiu animo gvatis Damnon,
; Hororon kaj Mort-Ombreon;
kun sak' la pendigist' enpaŝis ;
la nigran katakombon; kaj ĉiu
tremis ŝtelirante ; en
numeritan tombon.

'32 Ĉi-nokte la senhomajn
halojn ; plenigis terurantoj;
kvazaŭ fantom', tra l' fera
dom', ; paŝis silentaj plandoj;
gvatis vizaĝoj al la kaĝoj, ;
apud fenestro-randoj.

'33 Dorm' foras kiam viroj
ploras, ; kiuj neniam ploris;
stultulo kaj fripon', vigladon ;
senfinan ni deĵoris; tra ĉiu
cerb' kaj trema nerv' ; ties
Timego boris.

'34 Aĥ ve! terure estis kiam ;
ni ties kulpon pentis! ; Ni
funde en la koro vunde ; de l'
Pek' la glavon sentis; pro
sango sur alies mano ;
larmbrule ni lamentis.

'35 Al ĉiu pordo la Gardistoj ;
en feltaj ŝuoj iris; kun tim'
mistera pri l' mizera ; figur'
preĝanta miris, ; pri homoj
kiuj en paseo ; neniam preĝon
diris.

'36 Matena vento ve-suspiris, ;
sed daŭris la mallumo; post
lanta ŝpino de l' destino ; sin
teksis sort-plenumo; kun
preĝo-fino venis timo ; pri l'
Juĝo de la Suno.

'37 Mi vidis fine ombrajn
stangojn ; fariĝi krad' vitrala;
ĝi glitis ombre super lito, ;
trans kalka muro pala; kaj ie
en la mond', mi sciis, ; ruĝas l'
aŭror' fatala.

'38 Je l' sesa puris la karceroj,
; je l' sepa fuĝis sono; sed
siblo de flugila vibro ; ŝvebis
tra la prizono; eniris kaj glacie
spiris ; anĝel' kun mort-
ordono.

'39 Ne sur ĉevalo lunoblanka,
nek en purpura robo: ; nur
ŝnuron kaj la fal-tabulon ;
bezonas eŝafodo; sekrete, la
Harold' kviete ; venis kun
honta nodo.

'40 La okan horon ni atendis;
ni sentis tremon ŝvitan; ĉar ok-
sonoro, Fata horo, ; damnas la
malbenitan; por la plej bona
kaj malbona ; Fat' uzas nodon
glitan.

'41 Nenion povis ni krom
streĉe ; atendi por aŭguro; ni
restis side, ŝton-rigide, ;
kvazaŭ sur sol-insulo; sed ĉies
koro batis peze, ; frapante sur
tamburo.

'42 Kor-sprona, la horloĝ'
prizona ; vibrigis la aeron; de
l' Pek-armeo voĉis veo ;
senpovan malesperon, ; kiel
ve-krias en soleco ; leprul' la
kor-mizeron.

'43 Kaj kiel en kristal' de
sonĝo ; aperas hida sceno, ; ni
vidas, ke de l' trabo pendas ;
grasa kanab-rimeno, ; kaj
aŭdas gorĝon kriĉi preĝon ;
sub la strangola premo.

'44 La ve-angoron kaj doloron
; dum li amare krias, ; la tim-
eksciton, sangan ŝviton, ; plej
funde mi konscias, ; ĉar kiu
vivon plure vivas ; plurfoje
agonias.

,& Kvara parto:

'45 Sen la Diservo pasas tago :
en kiu homo mortas; la Pastro
palas, ĉar angoro ; al li la
koron tordas, ; aŭ io honta en
l' okulo ; mesaĝon mornan
portas.

'46 Tagmeze sonorilo sonis ;
por iri al l' ekstero; gardistoj
ŝlosil'tinte lasis ; ĉiun el la
karcero; ni marŝis laŭ ŝtuparo
fera, ; ĉiu el Sol-Infero.

'47 Ni marŝis en la dolĉa vento
; de dio, maltrankvile; pro tim'
vizaĝ' aspektis blanke, ; alia
jen argile; neniam homoj
alrigardis ; la tagon pli sopire.
.....

'48 Neniam hom' pli triste
gvatis ; el sia kor-mizero ; la
bluan tendon - la ĉielon ; de l'
anoj de karcero, ; kaj la
senzorgajn nubojn, kiuj ;
fordrivis en libero.

'49 Sed iuj kun klinita kapo ;
meditis pri l' postulo, ; ke
male devus morti, ili, ; se
justas la kalkulo: ; nur pri
vivul' li murde kulpis, ; sed ili
- pri mortulo.

'50 Repeko al sufero vekas ; la
mort-animon flame, ; Ĝin tiras
el mort-tukoj kaj ; revundas
ĝin profane, ; kaj igas ĝin
torente sangi, ; kaj ĝi resangas
vane.

'51 Fantastaj vestoj honte
signis ; nian pajac-kohorton;
silente, morne, ni rondiris ; la
glit-asfaltan korton; silente,
morne, ni rondiris ; neniu
flustris vorton.

'52 Silente, morne, ni rondiris;
tra ĉiu kavo mensa ; blovis
memor' pri hidaj kozoj ; kiel
tempest' potenca; Horor' nin
frontis, kaj Teruro ;
postrampis, pacienca.

'53 Fiere marŝis la Gardistoj, ;
kaj gardis nin en rotoj, ; tre
elegante, ĉar vestitaj ; en la
dimanĉ-kulotoj; sed la faritan
taskon montris ; brulkalko sur
la botoj.

'54 Kie antaŭe tomb' oscedis, ;
nenia tombo restis; apud la
hida mur' nur koto ; kaj sablo
ĝin atestis, ; kaj amaseto da
brulkalko ; nun la mortinton
vestis.

'55 Ĉar tiu havas veston, kian ;
ne volus la plej vanta; en
tombo sur prizona korto, ;
nuda, do pli malsankta, ; li
kuŝas kun pied-katenoj ; en
mort-kitel' flamanta.

'56 Tri jarojn kreskos nek
radiko ; nek sem' en ter'
apuda; tri jarojn restos ĝi
sterila, ; senbena lok', kaj
nuda; kaj frontos al ĉiel'
miranta ; sen eĉ riproĉo muta.
.....

'57 Kvazaŭ el koro de
murdinto ; kreskus venena
sproso! ; Ne vere! Dia tero
benas ; ekster la hom-supozo;
ruĝe la ruĝa kaj pli blanke ;
florus la blanka rozo.

'58 El lia buŝo rozo ruĝa! ; El
kor', blankroza krono! ;
Malkaŝas Kristo sian volon ;
strange al nia kono, ; kaj antaŭ
granda Pap' burĝonis ; seka
pilgrim-bastono.

'59 Nek ruĝa roz' nek blanka
rajtas ; parfumi la aeron; al ni
silikon oni donas, ; potpecon
kaj ŝtoneron, ; ĉar eble floroj
al simplulo ; venkus eĉ
malesperon.

'60 Neniam blanka roz' aŭ
ruĝa ; kovros tener-petale ; la
sablan teron, kiu nudas ; apud
la mur' novale, ; por signi, ke
la Filo mortis ; por ĉiu hom'
egale.

'61 Li havos pacon, ĉi tristulo,
; aŭ jam en pac' rifuĝas; post
la turment', ne plu Teruron ;
en taga lum' li fuĝas, ; ĉar
mankas Sun' kaj Luno kie ; en
ter-obskur' li kuŝas.

'62 Ĉe l' senhonora tomb' la
Pastro ; por preĝi ne sin ĝenis,
; nek signis per beata Kruco, ;
ke Krist' pekintojn benis;
tamen por savi tiajn homojn ;
Kristo sur teron venis.

'63 En paco: li nur pasis kie ;
la Vivo-lim' tenebras; pro li la
ritojn de kompato ; larm' de
fremdul' celebras, ; lin ploras
la pario, kaj ; ĉiam pari'
funebas.)

& Ora koko:

< Rekante per melodioj #Nova 9 el 17 batoj por strofo, entute 1887 paŝoj dum 20 minutoj, # Feroa 16 el 32 batoj por strofo, entute 3552 paŝoj dum 26 minutoj, kaj # Islanda 8 el 29 batoj por strofo, entute 3219 paŝoj dum 34 minutoj. Fabelon ruse verkis Aleksandr Puŝkin (1830). Tradukis Ivan Lubjanovskij. Baladige komponis kaj rekantaĵon aldonis Martin Strid (2015). Alternative eblas uzi melodion kaj rekantaĵon – jen modifitaj – de Olav Rajdistrozo.>

(#Melodioj:

((#Nova: <1,6:17> /dore mifa soso somi; rere mimi mire dodo; dore mifa soso mi; rere mimi rere doTi La) ?

(#Feroa: <2,3:4> /mi mi mi mi /so solfa mi i; /soso sofa mi i; /mi mi re re /mi milre do Ti; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do o) ?

(#Islanda: <1,6:29> /soso doso sola soso; mifa so mire do; soso soorelmi fami doomi; fa soso sofa milso; soso lalalaa sofa mire do dore; mire mimifaa soso lafa mi re do o)

)×111)+

(&Strofoj:

,& Unua parto:

'1 (

&Nova: Ie ekster rusa limo,
(×:;) En fremdlanda
malproksimo

(×:; **Ora koko turnas sin ; se
danĝero venas al la lim'.))**

?

(&Feroe: "/Ie ekster /rusa2
limo, (×:; – /**Koka kikirek'** –
;) /; En fremdlanda
/malpro2ksimo

(×:; /**Junaj viroj, viglaj viroj!**
; /**Iru plankon, dancu kun**
/granda em'!))

?

(&Islande: "/ Ie ekster rusa limo, (×:; **Kikerik'**, **malamik'** ;) En fremdlanda2 malproksimo

(×:; **Kaj ruĝa brulis fla2m'** ; **Oran kokon li metis sur la alt-stango ; oran kokon li metis sur la alta stang'**.)

)

'2 Regis fama car' Dodon'.
Iam estis li leon' –

'3 Militema kaj fiera, Por najbaroj tre danĝera.

'4 Sed post jaro pasis jar' –
Kadukiĝis brava car';

'5 Nun pri pac' li revis juste,
Sed najbaroj tiam ĝuste

'6 Ekkuraĝis trans la lim'
Atakadi lin sen tim'.

'7 Armis li armeon grandan
Por defendi la carlandon

'8 Kontraŭ svarmoj kaj panik'
Pro malica malamik'.

'9 Estis spertaj generaloj,
Sed ne trafis al bataloj:

'10 Marŝas norden regiment' –
Sed surprizas orient'!

'11 Trupoj tien, tamen hordo
Nun minacas jam de nordo.

'12 Car' Dodono ploris eĉ,
Ĉesis dormi pro la streĉ' –

'13 Ne carado, sed infero.
Plendas caro en letero

'14 Al sorĉisto kaj saĝul',
Astrologo kaj kastrul', –

'15 Eble helpos li ĉe l' plago
Baldaŭ venis tiu mago

'16 Kaj prezentis al Dodon'
Oran kokon je dispon'.

'17 "Jen sur stang' en altan lokon
Levu vi ĉi tiun kokon,

'18 Kaj la bordo servos vin
Sen perfido, sen obstin':

'19 Se nenio vin insidos,
La koket' kviete sidos;

'20 Se minacos vin danĝer',
Ĉu invado, ĉu konker',

'21 Ĉu tumulto, ĉu alarmo,
Ĉu alia ia svarmo –

'22 Tuj al la danĝera lok'
Turnos sin la ora kok',

'23 Kaj kun flame ruĝa kresto
Kikirekos li sur nesto".

'24 La kastriton nia car'
Rekompencas sen avar'.

'25 "Nun unuan vian peton
Tuj plenumos en kompleto

'26 Mi por tiu ĉi komplez"', –
Diris li en ĝojfrenez'.

,& Dua parto:

- '27 De sur stang' la ora koko
..... Gardas kontraŭ
limprovokoj:
- '28 Ĵus danĝero ĉe la rand'
Ekminacas al carland',
- '29 Tuj la kok' ekkikerikas,
Generalojn carajn vekas.
- '30 Ne carado, sed eden' –
Reĝu kuŝe sur kusen'.
- '31 Kaj najbaroj ekdomaĝis,
..... Plu ataki ne kuraĝis,
- '32 En konfuzo kaj en tim'
Retiriĝis for de l' lim'.

,& Tria parto:

- '33 Pasis unu jar', alia,
Sidas pace kok' magia.
- '34 Foje en matena fru'
Vekis ĉiujn laŭta bru':
- '35 “Caro! Patro de l' popolo!
– Krias ĉefo de l' patrolo,
–
- '36 Car', vekiĝu! Ja milit'!"
“Kial bruo kaj ekscit'?” –
- '37 Diras kun osced' Dodono,
– Ĉu rabistoj? Ĉu
friponoj?"
- '38 Kaj respondas ĉefpatrol':
..... “Car'! Panikas la popol',
.....
- '39 Krias kok' al orient',
Kvazaŭ tie akcident'".
- '40 “Tempo urĝas ! Ho, ĉieloj!
..... Ĉiuj tuj al siaj seloj!”
- '41 La carid' pli aĝa tuj
Gvidas trupon al fremduj'.
- '42 La koketo kvietiĝis,
Kaj la car' reendormiĝis.
- '43 Jen semajno pasis jam,
Pri la trup' – nenia fam':
- '44 Ĉu okazis jam batalo,
Mankas kia ajn signalo.
- '45 Ree krias l' ora kok',
Ree laŭ Dodona vok'
- '46 Kolektiĝas regimento;
Gvidas ĝin al oriento

- '47 La pli juna cara fil'.
Kaj denove la trankvil'.
- '48 Du semajnoj pasis, tamen
..... Pri la trup' – nenian
famon.
- '49 Ree krias ora kok', Ree
laŭ Dodona vok'
- '50 Tria trup' al front' rapidas,
..... Mem Dodon' la trupon
gvidas.
- '51 Sen bivakoj, sen prokrast'
..... Marŝas cara trup' kun
hast'.
- '52 Nek kadavrojn, nek
vunditojn, Nek tendaron,
nek militon
- '53 Oni vidas. Strange... tre!..
..... Malaperis la arme'!
- '54 Post semajn' ĉe horizonto
..... Ekaperis alta monto;
- '55 Vidas caro, luksa tend'
Staras apud monta fend',
- '56 Ĉe la tendo en silento
Kuŝas liaj regimentoj –
- '57 Ĉiuj mortaj!.."Bona di!"
..... Al la tendo kuras li...
- '58 Vidas la okuloj caraj:
Ambaŭ liaj filoj karaj
- '59 Mortaj kuŝas sur la ter'
Sen kirasoj, en koler'
- '60 Per glavpintoj fraton frato
..... Trapikinte sen kompatio.
.....
- '61 Nebriditaj du ĉevaloj
Paŝtas sin en sangaj valoj.
- '62 "Miaj filoj! Vi pereis, –
..... Kun malĝoj' Dodon'
ekveis, –
- '63 Ve al mi! Kruela sort'!
Miajn filojn rabis mort'!"
- '64 Ĉiuj veas kun Dodono.
Montoj, valoj pro resonado
- '65 Skuis sin. Dum ĉi-lament'
..... Malfermiĝis silka tend'...
.....
- '66 Kaj sur sojlo la fraŭlino,
..... De Ŝemaĥa land' reĝino,
.....
- '67 Bela kiel frumaten',
Tenas baskon de l' kurten'.
- '68 Kiel antaŭ sun' noktuo,
Eksilentis car'. Kun ĝuo
- '69 Ŝin rigardas, kaj el kor'
Malaperas la angor'
- '70 Pri la mort' de l' filoj
bravaj. Kun ridetoj ĉarme-
ravaj
- '71 Je la man' kondukas lin
En la tendon la reĝin'.
- '72 Ŝi sidigas lin ĉetable
Kaj regalas tre agrable;
- '73 Post regalo, post festen'
..... Lin kuŝigas sur kusen'.
- '74 Kaj ravita, enĉarmita
Plensemajnon senmedita

'75 Li festenas ĉe l' reĝin',
Obeante plene ŝin.

,& Kvara parto:

'76 Fine post semajn' ebria,
.... Frunte de armeo sia

'77 Car-Dodon' kun la reĝin'
.... Al la hejm' direktas sin.
....

'78 Ilin laŭta fam' eskortas,
Ver-malveron ĉien portas,

'79 Kaj renkontas la popol'
Ilin ĉe la metropol'.

'80 Ĉiuj kuras post la caro,
Kie sidas reĝa paro,

'81 Laŭdas ilin kun emfaz'...
.... Jen Dodon' en homamas'
....

'82 Vidas kun araba ĉapo
Sur la cigne-blanka kapo

'83 La kastritan magon kaj
Lin salutas kun la gaj':

'84 "He, saĝul"! Al mi aliru,
.... Kiel nun vi fartas? Diru!"
....

'85 "Car', – respondas griza
mag', – Venis tempo de l'
repag':

'86 Mian peton vi promesis
.... Tuj plenumi. Ĉu forgesis
....

'87 Vi komplezon de l' amik'
.... Dum danĝero kaj panik'?
....

- '88 Donu do al mi fraŭlinon,
..... De Ŝemaĥa land' reĝinon".
.....
- '89 Al Dodon' ne plaĉis pet',
..... Kaj li diras kun impet':
- '90 “Ĉu satano vin posedas?
..... Ĉu frenezo vin obsedas?
.....
- '91 Mi promesis, vere, jes,
Tamen via pet' – eksces'!
- '92 Kion faros vi kun ino?
Havu limojn la inklino.
- '93 Povas mi por la bonfar'
Vin kompensi sen avar':
- '94 Petu rangon altan, monon,
..... De l' carlando eĉ duonon –
.....
- '95 Ĉion donos mi al vi".
“Sole ŝin deziras mi!
- '96 Donu do al mi fraŭlinon,
..... de Ŝamaĥa land' reĝinon".
.....
- '97 Li obstinis tiel, ke Caro
kraĉis: “Ne kaj ne!
- '98 Vi provokas kolizion,
Do ricevos vi nenion.
- '99 Ne laŭ aĝo amfervor'!
Pelu lin, gardistoj, for!"
- '100 La kastrulo provis pledi,
..... Sed pli bone estus cedi:
.....
- '101 Lin per sia irbaston'
Frapis forte car-Dodon' –
- '102 Al la mago venis fino.
Ĉies tim', sed la reĝino:
- '103 Ĥa-ĥa-ĥa kaj ĥi-ĥi-ĥi!
Ĉu ne timas pekoni ŝi?
- '104 Car' eksentis malkvieton,
..... Sed afektis la rideton.
- '105 Tra la urba pord' Dodon'
..... Enveturas kun impon';
- '106 Sed subite sono stranga –
..... La koket' de l' pinto stanga
.....
- '107 Svinge flugas al la ĉar'
..... Kaj sur kapon de la car'
.....
- '108 Ĝi sidiĝas, kikirekas,
Lin je la tempio bekas,
- '109 Kaj Dodono kun stertor'
..... Falas – kaj la vivo for.
- '110 La reĝin' do malaperis,
..... Kvazaŭ song' forefemeris.
.....
- '111 La fabel' – nur ŝerco, lud',
..... Tamen estas ĝi alud'.

& Balado de Virgar:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 3567 paŝoj dum 40 minutoj. Norda Kantaro #4406. El feroa tradukis Martin Strid (2016). Strofoj '18, '53, '62, '86, '90, '91 kaj '105 duoblas. Klarigoj (*): '56 Alta seĝo = trono. '74 Rompi kunen: kolizii, kunkraŝiĝi.>

(#Melodio:

<1,5:> (

/MiLa LaTi TiTi dore; redo doTi TiMi; LaLa TiiTiTi TiTi
doore;re reedodo doTi LaTi;

(#Rekantaĵe: do TiLa So Ti Mi LaTi do do;Mi So SoFa Mi La;Ti
doTi La a)

)×122)+

(&Strofoj:

'1 Pri luktuloj bonaj multaj ;
prarakontoj temas ; famaj estis
en fruepoko ; pri ili mi
balademas.

(×: **Nun emas mi en danco
jam iri ; dum rozoj, lilioj ;
kreskadas tre.**)

'2 Mi kantas pri glavo
Mimiring' ; kaj forta ĉevalo
Skemingo ; kaj pri Virgar
Volundido ; heroo de famaj
atingoj.

'3 Virgar sidas en sia hal' ;
konsilas ne rikana ; tenas
kruĉon da bruna medo ;
ambaŭ heroaj manoj.

'4 Virgar tiel ekparolas ; post
batala brulo ; "Toleranta min
manajn hakojn ; ĉu monde
troveblas luktulo?

'5 Kiam sidas mi sur Skeming
; kaj Mimiringon komandas, ;
ja neni tiom bravas, ; nek
vivon mi nek pacon
marĉandas."

'6 Respondis unu el liaj
knaboj, ; ruĝo vizaĝon tegas: ;
"Ĉu vi aŭdis ke Tidrik reĝo, ;
li burgon en Berno regas?

'7 Staris li en lukta lud' ; kie
batojn herooj faras, ; se vi
venas sub liajn hakojn, ; vi en
danĝero staras."

'8 Virgar Volundido kolera ;
largan tablon forpuŝis, ; ĉiuj
tiuj karaj drinkaĵoj ; la halan
plankon duŝis.

'9 Virgar saltis el ora seĝo, ;
antaŭen de drinka tablo: ; "Kiu
estis el knaboj tiu ; heroe
paroli kapablas?

'10 Skeming min portos el
halo mia ; por trovi Tidrikan
grundon, ; poste mi per
Mimiringo ; mortigos lin kiel
hundon."

'11 Virgar vestas meme sin, ;
fortika hero-apero, ; kaj li
saltas al Skeming-dorso, ;
piedoj ne tuŝis teron.

'12 Rajdas Virgar Volundido ;
antaŭen rapidspure, ; oraj lude
sonoras ringoj, ; lia bona
iranto* kuris.

'13 Glavojn stumpas, kirasojn
rompas, ; sur tero veneno
fluas, ; irantoj knalas?palas,
herooj falas, ; fajroj en montoj
brulas.

'14 Trarajdis li sovaĝarbaron ;
kie dorme gigantoj kampis, ;
mavaj serpentoj sur tero kuris,
; drakoj montpinte rampis.

'15 Virgar sidas sur Skeming-
dorso, ; en mano Mimiringo. ;
Multajn li vidas heroojn rajdi,
; ardas brile klingoj.

'16 Diris lerta Hildibrando ;
kiam li vidis Virgaron: ; "Mi
tiun etan nanon ; fendos en
pecan paron!"

'17 Kornarko* antaŭ buŝo
diras, ; kaj Rejmar* viro
impona: ; "Li ne nanas pli ol
vi, ; sed estas rajdisto plej
bona."

'18a Rajdas ili kontraŭ Virgar,
; tri luktuloj duraj, ; peze saltis
irantoj grandaj, ; ĝisgenue en
tero kuras.

'18b Rajdas ili kontraŭ Virgar,
; tri luktuloj elitaj, ; peze saltis
irantoj grandaj, ; tero genuen
glitas.

'19 Virgar saltis iranton
bonan, ; bategis hero-koro, ;
rajdis kontraŭ tidrikuloj ;
ŝtalon brilan esploros.

'20 Hildibrand' havis glavon
levitan, ; li vorton diras
kolere: ; "Kial vi estas kirasita
; kurante sovaĝtere?"

'21 "Jen estas Virgar
Volundido ; mi ŝtalon fendi
povos, ; kaj mi rajdas al burgo
de Bern ; fortan Tidrikon
trovos.

'22 Mi konas bone majstron
Hildibrandon, ; el viroj la plej
bravan, ; Rejmaron junan kaj
Kornarkon jarlon, ; tidrikulojn
prave.

'23 Staris mi en luktulbatalo ;
rajdistojn faligis teren, ; ĉu vi
staremas al Virgar-hakoj ;
Mimiringoglavon tolere?

'24 Hildibrand' al forta Virgar
diras: ; "Mi al paco konsilas, ;
rajdos ni al la burgo do, ; kie
luktuloj trankvilas."

'25 Hildibrand' la luktulon
gastigis ; arbare kie li estis. ;
Mi ĵuras je mia kredo, ; laŭdo
Virgaron vestis.

'26 Luktuloj rajdas
sovaĝarbaron, ; malmulte
damaĝis ilin, ; vidis grandan
burgon, ĝi ; purarĝente brilis.
.....

'27 Vidis ili grandan burgon ;
dekstre en pejzaĝo. ; Ĝin regis
heroo Granalejv', ; li povis
luktulojn damaĝi.

'28 Dek du rajdistoj en burgo
estis, ; kiuj povis tranĉi
kirasojn, ; timiĝis altaj
tidrikuloj ; prefere sin hejme
lasus.

'29 Diris Virgar Volundido, ;
li tenas gliman glavon: ; "Mi
kredis ke alta Tidrik reĝo ; pli
bonajn luktulojn havus!

'30 Rajdos mi al burgo luktula
; kolojn por dehaki, ; dume vi
post Virgar forta ; arbare
povas graki."

'31 Virgar de tidrikuloj rajdas,
; la heroo alta, ; Skeming
kuras kiel birdo ĉiela, ; ĝis
ŝultroj tero saltas.

'32 Dek du luktuloj en burgo
restis, ; pri oro zorgis kutime, ;
teruraj estis ili por vidi ; kirase
kaj glavoglime.

'33 Diras rajdisto Granalejv' ;
kiam rajdan Virgaron vidas: ;
"Venas jen luktulo granda, ;
nin al batal' invitas.

'34 Falos li pro miaj manoj, ;
lian mi kapon forĉizos. ;
Glavon lian havos mi ; kaj
larĝan kirasĉemizon.

'35 Virgar saltis de Skeming-
ŝultroj, ; en lando la plej
brava, ; kaj iris li luktulojn
trovi ; kiujn medo lavas.

'36 Virgar iris al larĝa tablo ;
kie luktuloj sidis. ; Lacis li pro
sia veturo, ; drinki li avidis.
.....

'37 Diras la heroo buŝe, ;
plenas lia konvinko: ; "Jen vi
sidas luktuloj dek du, ; donu al
mi medan drinkon!

'38 Se ne ricevos mi laŭ emo ;
por malvarmigi koron, ; mi
dishakos vin en pecojn," ;
Virgar forta retoras.

'39a Eksaltis rajdisto
Granalejv', ; li tenas glavon
frapan: ; "Se vi ne iras for de l'
burgo, ; forhakos mi vian
kapon!"

'39b Eksaltis rajdisto
Granalejv', ; li tenas glavon
malmolan: ; "Se vi ne iras for
de l' burgo, ; dehakos mi vian
kolon!"

'40 Estis Virgar Volundido, ;
sian glavon svingas, ; fendas
rajdiston Granalejvon ; dis en
du pecojn distingajn.

'41 Fendis rajdiston
Granalejvon ; disen en pecojn
du ; kaj de ĉiuj la luktuloj ;
dehakis kapojn plu.

'42 Virgar arĝentan kruĉon
prenis ; de larĝa tablo por
lango, ; trinkis li tiom kiom li
emis, ; porkoj luktulan
sangan.

'43 Virgar de la burgo iris, ;
ĝoja pro drinko festa, ; rajdis
al la tidrikuloj, ; arbare ili
restas.

'44 "Ekstaru altaj tidrikuloj, ;
ne timu sklave-brute, ; rajdos
ni al halo hejmen, ; manĝon
malsupren gluti.

'45 Mi faligis luktulojn kiujn ;
kuraĝis neniu renkonti, ; saltu
en paco sur irantojn, ; grundo
ne sangigontas.

'46 Viroj kvar al halo rajdis, ;
sango luktula varmis, ; iris
poste al alta burgo, ; granda
kuraĝo armis.

'47 Oraj drinkoj luktulaburge ;
baldaŭ estis drinkitaj. ; Jam
vespero estis malfrua, ; viroj
iris en liton.

'48 Hildibrand' noktomeze
vekiĝas, ; ruzon perfidan
konis, ; glavon de Virgar el
ingo ŝtelis, ; sian anstataŭe
donis.

'49 Frue estis en mateno, ; la
suno ruĝon ŝovis, ; prestiĝis
luktuloj en la halo, ; rajdas
Tidrikon trovi.

'50 Diris Virgar Volundido: ;
"Igos mi burgon bruli ; laŭ
konsilo ĝis la fundo ; ene sidas
luktuloj."

'51 Siajn ĉevalojn ili suriras, ;
de l' burgo rajdas ili, ; flamoj
pelas al ĉielo, ; fajro vaste
brilis.

'52 Rajdas tra sovaĝarbar' ;
elitaj luktuloj kvar, ; ne vidiĝis
iam similaj ; sidi selojn karajn.
.....

'53a Grandan vidis ili burgon,
; ĝi brilis kiel arĝento, ; ĝin
posedis Tidrik reĝo, ; la terura
regento.

'53b Grandan vidis ili burgon,
; brili argente blanka, ; ĝin
posedis Tidrik reĝo, ; teruris li
sen manko.

'54 Virgar tiam ekparolas, ;
tranĉi li povis kirasojn, ;
"Rajdu vi al burgo supren, ;
min vi do postlasos.

'55 Portu al Tidrik reĝo
mesaĝon ; plej brava el ĉi
gentanoj, ; Virgar sur verda
kampo rajdas ; kun Mimiring'
en manoj."

'56 Tidrik sidas en alta seĝo, ;
rajdisto plej valida. ; Ne
ekzistis luktulo tiom brava ; ke
ĉevalon li ne desidas.

'57 Unu luktulo venis en
halon, ; ĉiuj mire ĉuas, ; oran
glavon ĉe gambo portis, ;
grandan kirason bluan.

'58 Tidrik sin el seĝo levis, ;
ridetis li bonkore: ;
"Bonvenon majstro
Hildibrando ; poste al via
sinjoro.

'59 Estis vi sovaĝarbare ; porti
sinjoran mesaĝon, ; drinku
nun laŭ tuta vivemo, ; plej
bonan mian omaĝon!"

'60 Diris fama Hildibrand', ;
staris en kiraso certa: ; "Virgar
sur verda kampo estas, ;
batalon li vin ofertas."

'61 Tidrik en kirason kuris, ;
brilis ĝi sune vigla, ; kaj sur
Falkon saltis li, ; li estis nokte
nigra.

'62a Tidrik rajdas kampon
antaŭen, ; ludas per nova
glavo. ; Sekvis lin rajdistoj
kelkaj ; spekti duelon bravan.
.....

'62b Tidrik rajdas kampon
antaŭen, ; per nova glavo
ludas. ; Sekvis lin rajdistoj
kelkaj ; luktuelon studi.

'63 Hildibrand' prenis drinkan
trogon, ; hero'farojn pretis, ;
rajdis poste al tidrikuloj ; por
Virgar forta meti.

'64 Rajdas Virgar sur verda
kampo, ; volis por neniu cedi,
; rajdi vidis luktulojn de
burgo, ; por lian vivon predi.
.....

'65 Virgar sur Skeming-dorso
sidas, ; tempo fariĝos triva, ;
rajdis kontraŭ Tidrik reĝo ;
batali pri glor' kaj vivo.

'66 Diris alta Tidrik reĝo, ; li
palpas akran feron: ; "Kiu
estas ĉi sklavaĉo ; kiu celas
min konkeri?"

'67 "Rajdis mi de mia halo ; ĉi
tien sur Skeming sidas, ; mi ne
havas markon sklavan ; sed
estas mi reĝido!

'68 Staris mi en batala ludo ;
kun luktuloj kortaj (??), ;
montru virecon Tidrik reĝo, ;
ataku Virgaron fortan."

'69 Rejmar prenis arĝentan
kornon, al Tidrik reĝo donis: ;
"Drinku jen mia reĝo, ; povas
humore?(al zorgoj) boni!"

'70 Rejmar diras koleramense,
; multis tia mise: ; "Haku
Virgaron Volundidon ; je la
ŝultroj disen!"

'71 Agis lerta Hildibrand', ;
pro granda kolero: ; batis li
Rejmaron junan, ; kiu falis al
tero.

'72 Hildibrando drinkan
trogon ; en Virgar-manojn
ŝovas: ; "Staru Virgar
Volundido, ; ĉevalon vi turni
povas."

'73 Virgar drinkis la
koston?karan drinkon ; en
luktula pleno: ; "Dankon lerta
Hildibrando, ; mi promesojn
tenos!"

'74 Kunrajdis ili sur verda
kampo, ; ne ludgajo juna, ; ne
ĉeemis jen timuloj, ; luktuloj
kraŝis kunen.

'75 Reĝoj du en batala ludo ;
glavojn turnas aere, ; paŝas
ĉevaloj peze sur grund', ; alian
sendi teren.

'76 Virgar terure hakas, ;
rajdas Skemingon splendan(?).
; Ŝildon li el Tidrik-manoj ; en
du pecojn fendas.

'77 Tidrik tiris aere glavon, ;
reĝa jen maniero, ; pecon li el
Virgar-kasko ; faligis al la
tero.

'78 Virgar svingis glavon
vigle, ; fortoj sufiĉu plue, ;
Tidrik lancon el manoj perdis,
; ne povis gajnon(?) ĝui.

'79 Saltis luktuloj de bonaj
irantoj, ; ne por milde cedi, ;
ili estis timiga vido, ; batali
iris piede.

'80 Tidrik reĝo kaj Virgar
forta ; luktis leone fortaj. ;
Timis altaj tidrikuloj ; sian
sinjoron morta. &

'81 Virgar frapis tutimpete, ;
forto ne volis fiaskon, ; celis
Tidrikan mortigvundon, ; sian
pinton en kaskon.

'82 Glavon svingis kolere
hero', ; la kaskon damaĝi
planis, ; lia bona glav'
rompiĝis ; inter ambaŭ manoj.
.....

'83 Tiam Virgar Volundido ;
en batalo vortis: ; "Damna
estu patro mia ; li glavon el
forĝo portis!

'84 Povus pli bone mia patro ;
por mi fari glavon, ; tiam
Virgar Volundido ; venkon en
lukto havus!

'85 Povus pli bone mia patro ;
glavon por mi forĝi, ; tiam
Virgar Volundido ; venkon en
regno portus!"

'86a Tidrik batalas per ora
glavo, ; luktula reĝo klaka, ;
celis fendi Virgaron fortan ; el
larĝa kirasa jako.

'86b Tidrik batalas per ora
glavo, ; luktula reĝo griza, ;
celis fendi Virgaron fortan ; el
larĝa kirasĉemizo.

'87 Hildibrand' glavon el ingo
tiris, ; luktule grandis li: ;
"Virgar ne la vivon perdu, ; li
bravas pli ol vi!

'88 Virgar faligis luktulojn dek
du ; kiujn vi ne venki povis. ;
Donu vivon, lin ne mortigu, ;
ne eblas pli lertan?viglan
trovi!"

'89 "Aŭdu lerta Hildibrand', ;
ordonas reĝo via, ; aŭ vi foriru
de miaj okuloj ; aŭ mi vin
fendos talie!

'90a Mi Virgaron Volundidon
; ŝultre senkapigos, ; kaj ne pli
da sklavoj Tidrikon ; al koler'
instigu!

'90b Mi Virgaron Volundidon
; de la ŝultroj kvitos, ; kaj ne
pli da sklavoj Tidrikon ; al
koler' incitu!

'91a Hildibrand' Mimiringon
donis al Virgar, ; fariĝas nun
lia ano: ; "Staru Virgar
Volundido, ; ne plu mi vin
ĉikanos!

'91b Hildibrand' Mimiringon
donis al Virgar, ; fariĝas nun
ano lia: ; "Staru Virgar
Volundido, ; mi ne plu kaŝos
glavon vian!

'92 Mimiringon el ora ingo ;
mi ŝtelis en luktulburgo, ; vian
stalfraton mi esti volas, ; en
ĝojo kaj en zorgo."

'93 Virgar brakumas
Mimiringon, ; en sango ruĝa li
brilas. ; Mi ĵuras je mia kredo
ke ; li kisis la glavon gracilan.
.....

'94 "Venu vigla Tidrik reĝo, ;
la glavoj kraŝe paru, ;
malmulte estimas mi vian
reĝnomon ; kaj alta
trupanaro!"

'95 Estis batal' sur verda
kampo, ; glavoj kirasojn
knalis. ; Ĉiu hero' ricevis
vundon ; kaj ĉiu povus fali.
.....

'96 Kunen iras reĝoj du, ;
armilojn uzi spertaj ; Virgar
hakis Mimiringe, ; per glavo
super verto.

'97 Virgar svingis per ĉiuj
fortoj, ; tian prauloj laŭdus. ;
Tidrik sub la hakojn venis, ;
ŝiron kirasan aŭdis.

'98 Estas Tidrik reĝo laca ; pro
batalo peza, ; ŝtalo forta ĉe
brusto rompiĝis ; kvin vundoj
flanke lezas.

'99 Ditmar forta el Berna
burgo, ; el ĉiuj reĝoj plej alta, ;
inter la du batalantojn ; sur la
kampo saltas.

'100 "Aŭdu Virgar Volundido,
; ne forte haki vi devas. ;
Tidrik en danĝero statas, ;
largâ kiraso krevis.

'101 Donos al vi mi riĉojn,
bienojn ; kaj bonan virinon
favore, ; vivon kaj pacon donu
al Tidrik, ; ne pinton fiksu
kore."

'102 Diris Virgar Volundido ;
dum kaskon fiksas
drape?klape: ; rajdos mi al mia
patro ; kun mane Tidrika
kapo.

'103 Tidrik sian vivon perdos,
; agnoske al mi pravon," ;
Virgar forta diras plue: ; "Mi
ne estas sklavo.

'104 Vi forrajdu Ditmar reĝo, ;
ludon ne deprecu, ; Se ne
obeas vi Virgar-vorton, ; li
hakos vin en pecojn!"

'105a Ruĝajn prenis ili
glavojn, ; povas mi riveli. ;
Tidrik reĝo kaj Virgar forta ;
inter si duelis.

'105b Ruĝajn prenis ili
glavojn, ; povis luktuloj
spekti. ; Tidrik reĝo kaj Virgar
forta ; lukte interplektis.

'106 Tidrik ĉirkaŭsvingas
glavon, ; li luktis per forĝa
fero, ; ŝildon li el Virgar-
mano ; fendis en du al tero.
.....

'107 Virgar hakas per
Mimiring', ; li luktas per eĝo
nura, ; skrapas for de Tidrika
kapo ; kaskon el oro pura.

'108 Kaskon li hakis de
Tidrik-kapo, ; haroj kaj haŭto
sekvis. ; Hako simila ne
vidiĝis, ; oston malvarmis eĝo.
.....

'109 Jen paliĝas tidrikuloj, ;
spertaj en lukta varmo. ; Estas
al mi vere dirite, ; ke teren
falas larmoj.

'110 "Aŭdu Virgar
Volundido," ; Hildibrando
diris. ; "Staris vi batale hodiaŭ
; kaj venkon jam akiris.

'111 Ne mortigu Tidrikon
reĝon," ; Hildibrand' postulas.
; "Venĝos lia morton ; ĉiuj
tidrikuloj."

'112 "Mi ne timas tidrikulojn ;
batale kontraŭstari. ; Pro via
vorto li vivon ĝuos ; kaj
multajn luktojn faros!"

'113a Tidrik reĝo kaj Virgar
forta ; luktopace haltas, ;
rajdis do ĉiuj al burgo de
Bern, ; jen la balado saltas.

'113b Tidrik reĝo kaj Virgar
forta ; luktohalte brakumas(?),
; rajdis do ĉiuj al burgo Berna,
; jen mi baladon sumas.

'114 Drinkis ili en Tidrik-halo
; laŭ pratempa moro. ; Virgar
forta laŭdon havis, ; ĉe
luktuloj gloron.

'115 Virgar fariĝis tidrikulo, ;
jen vera diro, ; sekvis fidele
sinjoron sian, ; lia plej bona
viro.)

& La Alta Kanto de la Amo:

< Rekante 20 aŭ 21 el 37 batoj, entute 3774 paŝoj dum 42 minutoj. Verkis Teo Jung (1926). Baladigis Martin Strid (2016) per melodioj novaj kaj rekantaĵo el vortoj de la antaŭparolo de la verko. Klarigoj (*): '1 La verko gajnis premion Natura Floro en Internaciaj Floraj Ludoj. ; Tiuj ludoj okazis en Universalaj Kongresoj de Esperanto ek de 1909 en Barcelono.>

(# Melodio:

<1,5:37> ((#Maĵora: /dodo TiLa LaSo SoSo; LaLa SoFa FaMi MiMi; SoSo dore mido dodo; SoSo SoSo LaTi do do;

(#Rekantaĵo: dodo TiLa So So; LaLa SoFa Mi Do; SoSo dore mi do; SoSo domi soso soso; So LaTi do do)) ?

(#Minora: /mi3mi dodo mimi redo; (# Rekantaĵo 1: mimi redo Ti La; dodo TiLa Si La;) mi3mi dodo mimi redo; mimi mimi redo Tido; dodo dodo TiLa SiLa; (# Rekantaĵo 2: LaLa LaLa LaLa; dore mimi redo Ti do; do TiLa Si La a;)))×102)+

(& Strofoj:

„& Parto 1:

'1 (#Maĵora: Alte super la abismo (×:;) Roko kun ruino pendas. ; Raŭkaj korvoj ĉirkaŭgrakas, ; Kaj en fendoj vento plendas.

(×: **La naturan floron* ; en la floraj ludoj* . ; Kantu pri la amo, ; fideleco kaj kuraĝo ; noblanimeco!**))

?

(#Minora: Alte super la abismo (×:; **La naturan floron* ; en la floraj ludoj***. ;) Roko kun ruino pendas. ; Raŭkaj korvoj ĉirkaŭgrakas, ; Kaj en fendoj vento plendas. (×:; **Kantu pri la amo, ; fideleco kaj kuraĝo ; noblanimeco!**))

'2 Antaŭ longe tiun rokon Altkastel' fiera kronis; Nokte el fenestroj lumaj ; Laŭta festobruo sonis:

'3 En salon' nun rubiĝinta,
Hejmveninte de ĉasado, ; Kun
kunuloj gaje festis ; Brava
kavalir' Konrado.

'4 Estis viro li tre forta,
Tre riskema kaj sen timo; Sed
sovaĝa en ĝuado ; Kaj en la
koler' sen limo.

'5 Tamen, kiel eĉ la feron
Fandas la puriga flamo, ;
Ankaŭ lia kor' moliĝis ; en la
ardo de la amo.

'6 Bel' Krimhildo ŝia nomo,
..... Kies amon li akiris, ; Kies
ĉarm' printempe virga ; Ĉies
miron al si tiris.

'7 Pacience provis bona
Bel' Krimhildo lin mildigi, ;
Al pli altaj, noblaj pensoj ; Kaj
bonagoj lin instigi.

'8 Sankta tasko de virino!
Beno estas la sukceso: ; Suna
amo kaj feliĉo ; Sen nubeto
kaj sen ĉeso.

„& Parto 2:

'9 Venis vok' de Sankta Patro,
..... Vok' al Kruca Militiro, ;
Kaj ĝin aŭdis tra la landoj ;
Ĉiu rava kavaliro.

'10 Ankaŭ kavalir' Konrado
..... Zonis glavon, prenis
ŝildon, ; Lasis hejmon kaj
kunulojn ; Kaj edzinon, Bel'
Krimhildon.

'11 Sanktan landon liberigi
..... Rajdis li, por venk' aŭ
morto. ; Ploris post li Bel'
krimhildo, ; Ĉar malhela estas
Sorto.

'12 Sidas ŝi en hejm' soleca,
..... Preĝas, ploras kaj laboras.
; Malrapide rampas tempo, ;
Atendado tro doloras.

„& Parto 3:

'13 Iam la kastelan pordon
Frapis fremda junsinjoro, ;
Kun la harpo sub la brako - ;
Signo de la trobadoro.

'14 Kaj li paŝas al Krimhildo,
..... Tuŝas kordojn - dolĉa
gamo: ; En sonoraj ondoj fluas
; Alta kanto de la Amo.

'15 Pri feliĉo kaj sufero
Kantas juna trobadoro, ;
Sentoj dolĉaj kaj amaraj, ;
Alta ĝoj' kaj mortdoloro.

'16 Kaj ŝi petis, kaj li restis,
..... en muziko ŝin instruis, ;
Ĝis la kant' de ŝiaj lipoj ; Kiel
de la liaj fluis.

'17 Kaj la trobador' foriris.
Ree ŝi soleca estis; sed la
harpo kaj kantado ; Ŝia
korkonsolo restis. -

'18 Jam forpasis tuta jaro,
sed Konrado ne revenis. ; Plu
solecan Bel' Krimhildon ;
Hejm' malgaja ne retenis.

'19 Iutage oni vidis en la mondo
On ŝin foriri; Sed de ŝia voj' la celon ;
Ja neniu povis diri.

„& Parto 4:

'20 Intertempe furiozis La milit' en Oriento, ; Akra estis la luktado ;
Inter Kruco kaj Krescento.

'21 Brave batis kavaliroj Brunajn filojn de l' Profeto. ; Jen la batalvoko: Kristo! ; Jen: Allah' kaj Mahometo!

'22 Ankaŭ kavalir' Konrado Kunleona fort' batalis, ; Kaj per lia glav' laŭvice ; Saracenaj kapoj falis.

'23 Tamen kie cento falis, Tie releviĝis milo. ; Sen decido la batalo ; Daŭris ĝis la lasta brilo.

'24 Noktmantelo stelbrodita Kovris sangan batalkampon, ; Super kiu preterŝovis ; Luno sian palan lampon.

'25 Kiam frumatena suno El dezert' leviĝis ore, ; Staris novaj turkaj vicoj ; Alvenintaj noktahore.

'26 Brave luktis kavaliroj Jam denove ĝis vespere. ; Multaj estis mortbatataj ; Aŭ kaptataj malespere.

'27 Ankaŭ kavalir' Konrado Estis viva, sed vundita. ; Kvankam li la morton serĉis, ; Li retrovis sin - kaptita.

'28 Kun aliaj sklavigite Kaj ligite je kateno ; estis li forkondukata ; Por laboroj, peza peno.

„& Parto 5:

'29 Servutante, en ĉifonoj, Ili penas kiel sklavoj - ; Kiujn iam la kiraso ; Kovris kaj ornamis glavoj.

'30 Mute, kun klinitaj kapoj Ili faras la laboron, ; Kaj ne sentaj vipobatojn ; nek alian korpdoloron.

'31 Kio ilin dolorigas, Estas iu prem' anima; Ĉar la pensoj ĉiam migras ; Al la hejmo malproksima.

'32 Al la montoj, al la valoj En la frankolando bela, ; Al kunuloj hejmmrestintaj, ; Al edzino korfidela.

„& Parto 6:

'33 Iutage - kia sono? Kia dolĉa melodio? ; Hejma lingvo - glora kanto! ; Ĉu miraklo? Fantazio?

'34 La palacon de l' sultano
..... La kaptitoj ŝtel-aliras ; Kaj
aŭskultas spirretene ; Kaj
rigardas, forte miras:

'35 Antaŭ la sultanon paron
..... Paŝis knab' gracia, bela, ;
Kantas pri la Frankolando, ;
Kantas ĝin kun voĉ' anĝela;
.....

'36 Kantas ĝin kun varma
koro, Kun rideto
ĉirkaŭbuŝe, ; Akompane
sonigante ; Kordojn
delikatatuŝe. -

'37 Kant' finiĝis. Emocie
Sidas la sultana paro, ; Emocie
ankaŭ staras ; En la korto la
sklavaro.

'38 Larmo brilas en okulo
De la bela sultanino, ; Puran
perlon ŝi malligas ; El ĉenet'
sur sia sino.

'39 Ĝin ĵetante al la knabo,
..... Montras ŝi favorrideton. ;
Kaj li riverencas danke, ;
Sentetante ŝian peton:

'40 Paŝas paŝon pli proksimen,
..... Reekludas - dolĉa gamo: ;
En sonoraj ondoj fluas ; Alta
Kanto de la Amo.

'41 Pri feliĉo kaj sufero
Kantas knabo-trobadoro, ;
Sentoj dolĉaj kaj amaraj, ;
Alta ĝoj' kaj mortdoloro.

'42 Kiam li pri ĝojo kantas,
..... Estas, kvazaŭ sun' aperas:
; Montoj brilas oraveste, ;
Sonaj ondoj tremfajreras.

'43 sed dum li suferon pentras,
..... Nigra nokto sin etendas;
El senlumaj abismegoj ; Mil
animoj plore plendas. -

'44 Kaj denove kant' finiĝis.
..... Ĉio restas mirsilente. ;
Sultanino nur singultas, ;
Larmoj falas jam torente.

'45 Kaj sultano Saladino
De la alta trono paŝas: ;
"Knabo," diras li, "miraklan ;
Sorĉon via voĉo kaŝas.

'46 Puran perlon mia kara
Beledzino al vi ĵetis; Sed de
mi, tuŝita same, ; Vi ne jam
favoron petis!" -

'47 "Ho, se vi la rajton donas -
..... Via estas ja la forto: ;
Liberigu tiujn sklavojn, ; Jen
starantajn en la korto

'48 Samlandanoj ili estas
Kaj vidante sortobaton, ; Kiu
akre ilin trafis, ; Sentas mia
kor' kompaton!" -

'49 "Multon, knabo, vi
postulas, Kvankam ne por
vi persone; Sed promeso estu
firma, ; Ne ŝanĝebla
laŭbezono!

'50 Baldaŭ viajn samlandanojn
 Hejmen portu vel' kaj
 masto! ; Sed vi, knab',
 ankoraŭ restos ; Kelkatempe
 mia gasto!

'51 Via harmonia ludo,
 Viaj kantoj melodiaj ; Estos
 artoplena ĝuo ; Por soifaj
 sentoj niaj!

'52 Sciu, altvalorojn tenas
 Mia trezorejo kara: ; Kontraŭ
 vera arto ĉiam ; Mi min
 montris malavara!

'53 Poste, ĝis la landa limo,
 Sur rapidaj ras-ĉevaloj ;
 Vin kondukos tutsekure ;
 Kavalkado da vasaloj!" -

'54 Ĝoj' ekbrilis en l' okulo
 De la knabo-trobadoro, ;
 Kaj profunda klin' esprimis ;
 Lian dankon pro l' favoro.

'55 Same ĝojis la kaptitoj,
 Kies koroj preskaŭ krevis: ;
 Libereco! Jam ĝi venos, ;
 Kiun longe ili revis.

'56 Kio ilin dolorigis: For
 terurta prem' anima! ; Baldaŭ
 ili ja revenos ; Al la hejmo
 malproksima!

'57 Al la montoj, al la valoj
 En la Frankolando bela, ;
 Al kunuloj hejmrestintaj, ; Al
 edzino korfidela.

,& Dua duono:

„& Parto 7:

'58 Kavalir' Aŭtuno spronis
 Sian grizan ventĉevalon - ;
 Kie ĝiaj hufoj frapas, ; Ĝi
 ellogas la fatalon.

'59 Velkas vivo, flavas floroj,
 Kaj malgaja melodio ; Tra
 la nudaj branĉoj flustras, ;
 Tremas lasta nur folio. -

'60 Kaj alian kavaliron
 Vidas landon mi trapaŝi: ; Sen
 ĉevalo, malfiere, ; Kvazaŭ li
 sin volus kaŝi.

'61 Ne kiras' juvelradia
 Lian bruston plu protektas;
 Nur ĉifonoj. Jam neniu ;
 Kavaliro lin konjektas.

'62 Lace penas li, sin trenas
 Dum la longa voj'
 surstrata. ; Unu penso nur:
 Antaŭen ; Al la hejmo
 sopirata!

'63 Ĉion li feliĉe venkis:
 La atakon de l' korsaroj, ;
 Uraganon, ŝiprompiĝon, ;
 Eraradon sur la maroj!

'64 Kie la kunuloj vagas?
 Ĉu pereis, hejmenvenis? ; Li
 ne scias. Ĝis ĉi tie ; Sola li sin
 pene trenis.

'65 Sorto ilin disblovadis
Kiel vento en aŭtuno, ; Li nur
- lasta folieto - ; Alkroĉiĝis al
Fortuno.

'66 Baldaŭ celon atingonte,
..... Nun li ne plu iri povas. ;
Staras gastodom' ĉevoje - ; Tie
li ripozon trovas. -

„& Parto 8:

'67 Mastro metas dolĉan
moston: "Kien, kaj el kiu
lando?" - ; La migranto en
ĉifonoj ; Ne respondas je l'
demando.

'68 Sed preninte fortan gluton,
..... Mem al mastro li parolas: ;
"Kiel tie ĉi aferoj ; Statas, ĉu
vi diri volas?" -

'69 Kaj la mastro tro inkline
..... Prin kastelo ekrakontas, ;
Ke perfida sinjorino ; Eĉ
adulti jam ne hontas.

'70 "Brava edzo militiris
Kaj ŝin devis lasi sola. ; Venis
juna bela viro - ; Kun parolo
tente-mola.

'71 Longe restis la fremdulo,
..... Tamen fone sin retiris. ;
Ankaŭ ĉasta Bel' Krimhildo ;
Iutage monden iris.

'72 Longe staris la kastelo
Tutsoleca, forlasita, ; Ĉar nur
antaŭ kelka tempo ; Ŝi revenis
riĉdotita." -

'73 "Vi mensogas!" krias
gasto, "Vian langon
gardu, bubo!" - ; "Ŝajne vi pli
bone scias," ; Mokas mastro,
"ja sen dubo!" -

'74 Sur la seĝon gasto falas,
..... Kaptas lin sovaĝa spito. ;
Poste li longtempe sidas ;
Silentante en medito.

'75 Sed subite li eksaltas -
Most' verŝiĝas, seĝo krakas -, ;
Kaj senlima furiozo ; Kaj
kolero lin atakas.

'76 Jam li estas eksterdome.
..... mastro sentas fortan
miron, ; Ne ekkonis en la
gasto ; Revenintan kavaliron.
.....

„& Parto 9:

'77 En salono ĉe fenestro
Bel' Krimhildo jen enpense! ;
Vento la muregojn skuas, ;
Nub' peliĝas nigre-dense.

'78 Dolĉe-duba antaŭĝojo
Laŭtfrapigas ŝian koron. ;
Kiomfoje ŝi travivis ; Reve la
revidan horon!

'79 Nun ĝi estas jam
proksima: Baldaŭ la
amato venos ; Kaj fidelan la
edzinon ; Amoplene
ĉirkaŭprenos- -

'80 Pord' puŝiĝas. Enpenetras
..... Homfigur' teruraspekta ;
Kaj sin ĵetas sovaĝege ; Al
virino sensuspekta.

'81 "Jen vi havu vian punon,
..... Vi serpento malfidela!" - ;
Kaj en lia man' ekfulmas ; Jam
ponardo koroncela.

'82 Mortpaliĝas Bel'
Krimhildo Pro sensenca la
insulto: ; Ĉu li volas -
nekredeble! - ; Ŝin akuzi pri
adulto?

'83 Sed vidante, ke aŭskulton
..... Por defendo ŝi ne trovas ; -
Ĉar li staras vengoprete -, ; Ŝi
nur tempon gajni provas:

'84 "Se ja morton mi meritas,
..... Mi ne mortu sen preparo: ;
Unu preĝon nur konsentu ;
Antaŭ sankta la altaro!" -

'85 "Unu preĝon - sed rapide!"
- Jam salonon ŝi forlasis. ;
Kavalir' Konrad' atendis - ; Ne
rapide tempo pasis.

'86 Ĉar tro longe daŭras preĝo,
..... En koler' la kavaliro ;
Kuras al la kapeleto. ; Sed jen
- lin haltigas miro:

'87 Jam ne trovas li
Krimhildon, Sed la
knabon, kies kanto ; Pordojn
de Liber' malfermis ; Al la jam
malesperanto.

'88 Kaj la knabo harpon
prenas, Kordojn tuŝas -
dolĉa gamo: ; Ekaŭdiĝas jam
konata ; Alta kanto de la Amo.

.....

'89 Pri feliĉo kaj sufero
Kantas knabo-trobadoro, ;
Sentoj dolĉaj kaj amaraj, ;
Alta ĝoj' kaj mortdoloro.

'90 Kavalir' Konrado staras -
..... Rigidiĝis la rigardo. ; Lia
mano malleviĝas, ; Teren falas
la ponardo.

'91 Nun en knabo-trobadoro
..... La edzinon li rekonas. ;
Surgenuen li sin ĵetas: ;
"Sankta vi, ĉu vi pardonas?"

.....

'92 Kaj ŝi levas lian kapon
..... Kaj pro emocio tremas ;
Kaj sur lian kulpan frunton ;
La pardonokison premas.

„& Parto 10:

'93 Majo sternis flortapiŝojn
..... Sur la belan Frankan teron.
; El kampar' alaŭdoj trile ;
Levas sin en bluaeron.

'94 Oraj sunradioj plektas
Varman ĝojon tra la lando, ;
Per agrabla tuŝ' karesas ;
Junan paron sur verando.

'95 Man' en mano, kor' ĉe koro
- ; Jen Konrad' kaj Bel'
Krimhildo, ; Rigardante
malproksimen ; Al la rave
sorĉa bildo.

'96 Ĉie la Printempo ridas.
..... Admirinda panoramo! ;
Tuta la natur' rekantas ; Altan
kanton de la Amo.

„& Parto 11:

'97 Kaj infana ĝojo trilas,
La kastelon rejunigas: ;
Knaboj du kaj knabineto ;
Amon eĉ pli firme ligas.

„& Parto 12:

'98 Longe vivis Konrad'idoj
..... En feliĉo kaj en gloro. ;
Brava gento ili estis: ; Ja sen
tim', sed ne sen koro.

'99 Tamen, kiel ĉio tera,
Fine ankaŭ ili ĉesis; Sed ilian
nomon oni ; Ĝis hodiaŭ ne
forĝesis.

'100 Ruinaĵo nun funebras,
..... Kie altkastelo tronis, ; Kaj
la raŭkaj korvoj grakas, ; Kie
iam festoj sonis.

'101 Sidis inter la ruinoj
Mi, aŭskultis korvan grakon;
Metis, laca de migrado, ;
Pezan kapon sur la brakon.

'102 Kaj en sonĝo reviviĝis
..... Amokanto melodia. ;
Kion ĝi al mi inspiris - ; Jen la
frukto poezia!)

& Uraŝima:

< Rekante 15 el 29 batoj trifoje por strofo, entute 4263 paŝoj dum 48 minutoj. Japanan popolan fabelon poemigis Julio Baghy (Ĉielarko, 1966). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:29×3=:87> (

(/LaLa dore mi mi soso sofi mimi; rere mimi mimi mi mi doTi LaLa;

(#Rekantaĵe: La dore mi mimi sofa mi mi; re rere miimi i;mi mi doTi La La))×2

/LaLa LaTi do re mire doTi LaTi; dodo dore mifa so fa mire doTi;

(#Rekantaĵe: La LaTi do dore doTi La So; do dore miifa a;soo mi mido Ti La;)

))×49)+

(&Strofoj:

'1 /Hej, infanoj karaj, nun vin forte tenu, ; ek al fablomondo kun mi migri venu!

(×: &R:; **Pasas la tempo dum nia danco ; Ŝvite nin trempu ; Nun kaptu la ŝancon.**)

/Ni rapide kuros trans cent montojn, marojn, ; retro en la Tempo eĉ pli ol mil jarojn; (×: &R)

/per sepmejraj paŝoj miaj botoj saltas, ; post momento, vidu, ni ĉe celo haltas... (×: &R)

,&1:

'2 Kiel milde muĝas maro orienta, ; ĉerizflorojn portas disen blovo venta, kie neĝa pinto de la Fuĵijama ; brilas brilante sub la sun' japana,tie en vilaĝo, ĝuste sur marbordo, ; staris kabaneto en mizera korto.

'3 En la kabaneto kun muraro
ŝima ; vivis brava knabo,
nome Uraŝima.Fiŝi ĉiutage
li boate iris, ; reton en la
maron ĵetis kaj retiris,
.....poste la kaptaĵon vendis li
sur placo ; por gepatrojn helpi
file kaj sen laco.

'4 Foje li serĉante vade la
bonŝancon ; remis kaj forgesis
tempon kaj distancon.
.....Kvankam tutan tagon li
provadis, ŝvitis, ; lin feliĉo
spitis, fiŝoj preterglitis;
.....poste surprizite, mire li
rimarkis, ; ke löa horizonton
vesperruĝo arkis.

'5 Reton retirinte nazon de l'
boato ; tuj li turnis borden per
remila bato,sed el bordo
vidis li eĉ ne konturon, ; al ĝi
tempo sternis nigran
noktveluron.Luno, steloj
mankis, post la nuboj ludis;
mevoj eksilentis, eĉ la ondoj
mutis.

'6 Malfacila sorto estas tiel
vivi, ; ofte celperdinte
longhajn horojn drivi!
.....Tamen fortan fidon havis
Uraŝima; li persiste remis sur
la mar' senlima.Horoj, eble
eĉ pli, jam noktmezo pasis, ;
kiam al ripozo li sin lace
lasis... ..

'7 Dum li tiel lace, apatie sidis,
; en la retofundo, kion li
ekvidis? Maran testudeton,
infanmane grandan, ; al li
palpebrume time rigardantan.
.....Tiel eta besto estas
senvalora, : pensis li, por
gajno post la tag' labora!

'8 Subtaksante tiel li reĵeti
volis, ; kiam la testudo jene
ekparolis: "Haltu,
Uraŝima! Min vi ne reĵetu, ;
sed nun min aŭskulti, poste
sekvi pretu!Ŝajno vin ne
trompu! Mi ne estas besto, ;
sed kortega princo en sorĉita
vesto,

'9 kuriero grava de l' submara
reĝo, ; kies nura volo regas
kiel leĝo. Li ordonis al mi
– devas vi kompreni – ; nun
mesaĝon diri, poste vin
kuntreni,ĉar lia filino,
reĝidino nia, ; nun suferas pro
vi, pro dezir' pasia".

'10 "Kara testudeto, Uraŝima
ridis, ; "vian reĝidinon mi
neniam vidis; kiel mi do
povus igi ŝin suferi?" ; "Ŝi
mem ĉiutage vidis vin aperi.
.....Vin ŝi enamiĝis, edzo vin
elektas". ; "Mi eĉ ne imagas,
kiel ŝi aspektas?!"

'11 "Nia reĝidino estas mem la Belo. ; Tiel bela vivas nur en la fabelo. Kiam ŝi dormetas, marlazuro mutas, ; kiam ŝi vekigâs, mevoj ŝin salutas,kiam ŝi sin turnas, ondoj kun ŝi dancas, ; ŝipoj sur ondare gaje sin balancas".

.....

'12 "Al vi nia reĝo donos princan rangon!" ; "Mi distingon danki havus mutan langon"."Vin ravante distros centoj da sirenoj!" ; "Por senviva homo vanus farsaj penoj"."En koralpalaco vartos vin komforto!" ; "Jes, en luksa kriptu kuŝus mi en morto".

'13 Vane li protestis, vane li diskutis, ; al li sian volon la testudo trudis:"Lasu la skrupulojn! Sen hezito saĝe ; tuj sur dorson mian sidu do kuraĝe!"Fine volperdinte Uraŝima cedis, ; faris tion, kion ĝi sugestis petis.

'14 Tuj li spertis, ke ĝi perdis etan grandon, ; vaste plilarĝigis trans boato-randon. Lin la mortotimo lasis for momente, ; nur pri la princino pensis li atende, sed ne longe, ĉar ĝi – slup! – en maron saltis, ; ĝis palaco reĝa ĝi nenie haltis.

'15 Kiam mateniĝis, suno jam leviĝis, ; supermare mevoj malsatantaj kriĉis.For de l' bordo ie ondoj ronde dancis, ; la boaton orfan lule ekbalancis; ĝiafunde kuŝis reto kaj remilo... ; Sur la vasta maro regis la trankvilo.

,&2:

'16 Inter koralmontoj, ĝangaldensaj algoj, ; preter ŝipruinoj (homaj katafalkoj),la testudo naĝis rekte al la subo, ; kie dise kuŝis rubo apud rubo; sed al Uraŝima la vojaĝo tuta, ; kvankam estis longa, ŝajnis nur minuta.

'17 Li primiris, ke en ŝlimtegataj barkoj ; dormas nun kviete maraj monstroj, ŝarkoj;aliloke inter stangoj de la mastoj ; strangaj fiŝoj naĝas per vostfinaj kvastojkaj en mara sablo rustmorditaj ankroj ; servas ripozeje por omaroj, kankroj.

'18 Uraŝima miris mute kaj sentime, ; ĝis ĉe rezidejo ili haltis fine. La palaco reĝa estis ŝipgiganto ; por la korteganoj, por la marreganto; ĉe pordego larĝa, rifborita truo, ; tien-reen naĝis garde ŝarko-duo.

'19 Ilin jam atendis du balenoj
digne ; kaj permeson donis per
naĝilo signe; por eskorti
feste, kiel mil diabloj, ;
deĵorantaj kankroj kun tondilaj
sabroj tuj viciĝis orde,
retroire tretis, ; al la gasto dece
la rigardon ĵetis.

'20 Sed en tronsalono ĉiuj
pasis vere, ; ke la bestan
veston lasis for eksterekaj
en homa formo noble elegante
; etikete agis, riverencis vante;
.....sole restis strangaj nur la
kapornamoj, ; ĉar variis bunte
brankoj, konkoj, skvamoj.

'21 Reĝo, la longbarba, digne
sur la trono ; sidis kaj apude
sidis amazono.Ŝi, la
reĝfilino, dolĉe-sorĉe ridis, ;
ĉies sklavan amon tuj ŝi
almilitis.Uraŝima ne plu
pensis pri la Tero, ; dum la
Reĝa Moŝto traktis pri l' afero.
.....

'22 "Sciu, Uraŝima, vin feliĉo
trafis; via juna belo la filinon
ravis.Ŝian kordeziron
volas mi plenumi... ; Ke vi
povus al ŝi inde amindumi,
al vi mi donacos riĉon, rangon
princan ; kajaldone estri
landon, la provincon".

'23 Uraŝima mire staris, ne
respondis; en li amo ŝtorme,
sangovipe ondis. Ŝi ja estis
fable korpiĝinta Belo, ;
okulparo ŝia por li la ĉielo,
lin sur lipoj ruĝo de l' koralo
loĝis, ; flate pri kisemo per
ridet' prologis.

'24 La silento longa reĝan
koron spronis ; kaj li tre afable
ŝin kaj lin admonis: "Do,
infanoj miaj, vi jam ne plu
mutu, ; sed pri kordeziro ion
ekbalbutu!Vi, filin', unue,
poste Uraŝima, ; diru, kio
nestas en la fund' anima!?"

'25 "Vi, karulo, estas juna,
bela, brava, ; por mi, vin
amanta, idealo rava.Mia
edzo vin mi por mi nun
elektas". ; "Reĝidino bela,
sorton dioj plektas.Al vi
min adoro ligas diktatore;
edzinetu vin mi petas
humilkore".

'26 Por la geedzigo sekvis tuj
celebro: ; reĝa patro tuŝis ilin
per la scepro,ligon sur la
manojn per la barbo faris, ;
leĝa paro ilin krie li deklaris.
..... Post unua kiso tondris
vivu-krio... ; Tiel simpla estis
la ceremonio.

'27 Sed en la palaco
komenciĝis balo: ; sonis la
fanfaro, tintis la cimbalo,
.....kun la junedzino ĉiu volis
danci, ; unu la alian lukte eĉ
avanci;la sirenoj ŝerce la
junedzon prenis, ; per la
rondodanco lude lin katenis.
.....

'28 Post la balofino ĉiu
kortegano ; bestvestite naĝis
kiel akompanoal
princlanda hejmo de la paro
juna: ; ne tro trua jaĥto, lukse
oportuna; en ĝi la
komforto super la imago... ;
Tiel brile pasis la unua tago.
.....

'29 Dumatage ili landon
travojaĝis ; sur balen' sidante,
dum la besto naĝis,de ĉio
ravite en submara lumo ;
sinforgese vivis dum la "miel-
luno", zorgojn pri l'
princlando al servistoj lasis, ;
tute ne rimarkis, ke la tago
pasis.

'30 Venis tria tago, kun ĝi
rememoro ; pri gepatroj,
hejmo, pompa ĉerizfloro.
Uraŝima larme, nostalgie
ĝemis, ; por revidi ilin al li
penso venis. Lia edzineteto
lin dorlotis ame, ; tamen lin
turmentis "vivi estas vane!"
.....

'31 "Kio estas al vi? Kio vin
torturas? ; Ĉu vi min ne
amas?" "Sed jes", li
murmuras; "tamen,
edzineteto, jen terura vero, ;
vokas min, revokas la gepatra
tero. Vin mi amas vere,
sole kaj fidele, ; sed ĉi sento
premas, vipas min forpele".
.....

'32 "Uraŝima mia, edzo kaj
amato, ; vidi vin suferi estas
sortobato. Se jam vivoĝojo
en vi agonias, ; mortos eĉ la
amo... Jen mi opinias. Vin
al mia koro mi preferus ĉeni, ;
sed... sed... mi ne volas, kara,
vin, reteni".

'33 Reĝidino bela afliktite
lante ; iris kaj revenis kesteton
tenante.Sur kesteto ora
orsigelo pendis. ; Al li por
kunporti triste ŝi etendis:
"Kiam vi orfiĝos, sekvu mian
peton: ; ŝiru la sigelon, rompu
la kesteton!"

'34 Lin ŝi kisis laste, ŝin li al si
prenis, ; koron al la koro ili
longe premis,poste
pensrapide – ho, kruela krudo!
– ; por lin rehejmigi venis la
testudo...Arda lasta kiso
sekiĝi ne povis, ; ĉar jam
Uraŝima sin sur bordo trovis.
.....

,&3:

'35 Pompis ĉerizarboj, brilis suno maja, ; birdotriilo sonis korkarese gaja.Fore de l' vilaĝo sur la mara bordo ; jen kabano staris en mizera korto. Sentpelate kuris nia Uraŝima ; al gepatra hejmo, kara kaj intima.

'36 Nur tie li vidis, ke en tiu domo ; reton nun riparas iu fremda homo,juna virineto ĉe l' fajrujo staras, ; sur la korto knaboj argilturon faras...Al li Uraŝima salutvorte tretis, ; pri gepatroj siaj li informojn petis.

'37 La fremdulo miris, ĉesis la riparon: ; "Mi neniam konis la nomitan paron... Eble en vilaĝo ili trovis lokon". ; Uraŝima kriis: "Lasu nun la mokon!Depost infanaĝo en ĉi dom' mi loĝas". ; "Knabo, vin pri stulto rajte mi riproĉas".

'38 "Antaŭ tagoj tri mi iris al la maro. ; Tie ĉi min konas ja ĉiu najbaro...Ĵus rerajdis mi sur dorso de l' testudo!" ; Li aserton sekvis milde post konkludo:"Knabo, do komprenu, diros la najbaroj, ; en ĉi kabaneto loĝas mi de jaroj".

'39 Sed en la vilaĝo Uraŝima pene ; eĉ de dom' al domo ire kaj revenevane demandadis pri si ĉiun homon; ili lin ne konis, eĉ ne lian nomon.Fine al la pastro li decidis iri, ; al li la aferon konsilpete diri.

'40 La maljuna pastro, eĉ centjara eble, ; en ŝim-ranca domo, eĉ miljara meble,sidis inter libroj murmurante preĝojn ; kaj en kap' tenante diajn, terajn leĝojn.Uraŝima dece kline lin salutis; li responde al li pastrajn benojn ŝutis.

'41 "Ho, saĝulo sankta, premas min ĉagreno, ; ĝi venenas tute ĝojon de l' reveno.Sciu, nur tri tagoj, ne pli, povis pasi, ; kiam la vilaĝon devis mi forlasi,tamen la reveno strangan sperton donas: ; min neniun konas, mi neniun konas".

'42 La bonvola pastro mire kaj atente ; post tia rakonto pensis eĉ momente,ke la juna knabo volas lin priŝerci, ; tamen li ekprenis libron – nomon serĉi. Libro libron sekvis, fine en tro ŝima, ; en la centa staris nomo Uraŝima.

'43 Li eklegis mire, legis surprizite ; kaj relegis kiel estis ja skribite "Brava juna knabo, nome Uraŝima, ; fiŝkaptadi iris al la mar' senlima, sed li ne revenis, tie havis faton, ; ondoj borden portis sen li la boaton".

'44 Mire li plu gapis al la ŝima paĝo, ; eĉ momenton pensis "min forlasis saĝoaŭ spiriton vidas, ĉar ĉi knabo juna ; antaŭ mi aperis dum la tago suna..." Fine liajn lipojn fakta vero lasis: ; "Ne tri tagoj, sciu, tri mil jaroj pasis!"

'45 Estis la momento gorgopreme peza. ; Nedirante dankon por bonvol' kompleza Uraŝima pasis for el pastra domo, ; vagis tra la stratoj kiel la fantomo. "Ve al mi", li ĝemis, marŝis svene, fale, ; "havi du patrujojn estas ja fatale!"

'46 Uraŝima kuris al la bordo mara, ; tie li kriadis al edzino kara,eĉ la testudeton voki vane provis, ; nun la maro mutis, sin nenio movis.Tuj terura penso, sentis li, lin premas, ; ke li al la mondo ne plu apartenas.

'47 Uraŝima sentis sin tre orfa, sola, ; pro funebro sia tute senkonsola.Dum li vokis helpi la edzinon foran, ; lia mano tuŝis la kesteton oran.Tuj li rememoris pri ŝuia deziro; ĝin li pugne rompis post sigelforŝiro.

'48 El kesteto flugis nubo formomanka: ; lia animeto, pura, neĝe blanka.Suprenflugis ĝi kaj ju pli suprenflugis, ; des pli li junecon perdis kaj kadukis...Kiam la nubeton glutis spaco norda, ; polvo li fariĝis sur la sablo borda.

'49 Milda vent' ekblovis ĉe la Fuijama, ; ĉerizflorojn portis for de l' bord' japana. Milda vento kirle, eble fari solvon, ; miksis bordan sablon, blankan homan polvon.Kriĉis nur la mevoj, muĝis nur ondar, ; milda vento blovis, blovis al la maro... ..)

& La travestiita muzo:

< Rekante 99 el 197 batoj por strofo, entute 4334 paŝoj dum 48 minutoj. Verkis Georgo Peterido Peneter (1950). Baladigis (2016) Martin Strid per novaj melodioj kaj rekantaĵo. Klarigoj (*): '4 Anfrakto: turnareco, multkurbiĝeco>

(# Melodio:

<:197> (#:

mi /soso lala so mido mimi redo LaaSo;So dodo TiTi La SoSo
dodo rere miimi;do dodo TiTi La SoSo dodo rere miimi;mi soso
lala so mido mimi redo LaaSo;;

do miso lala so mido mimi redo LaaSo;So dodo TiTi La SoSo
dodo rere miimi;do dodo TiTi La SoSo dodo rere miimi;mi soso
lala so mido mimi reTi rere;;

(Rekantaĵe: mi mifa re doTi La So o; dodo mimi soso lala somi re
re; mi mifa re doTi La So o; dodo TiTi mimi reTi La La So; do
omi re fare miso re e; do mido redo TiLa So mi i; do omi re fare
miso re e; do mido redo TiLa So do)

o;mi rere refa mi miso fafa lati sooso;so mimi rere Ti TiTi
doododo Lado SooSo;So dodo miso soofafa refa reTi do do;;mi
rere refa mi miso fafa lati sooso;so mimi rere Ti TiTi doododo
Lado SooSo;So dodo miso soofafa reTi SoTi do do

(Rekantaĵe: do fafa lala so mido fafa lati; so omi re mire do La
So; do omi re fare miso re e; do mido redo TiLa So mi i; do omi
re fare miso re e; do mido redo TiLa So do o)

)×22)+

(& Strofoj:

,& Herkulo kaj la centaŭroj:

,,&1. Nemeo:

De /kiam la Venkanto en l' arbarego muska ; ekĉasis grundesplore laŭ la timiga spuro, ; perfidis la mortlukton nur sola blekomuro, ; Silentas ĉio. Dronis en nub' la sun' krepuska. ;;

Fuĝante al Tirinto tra kampoj aŭ arbusta ; densej', paŝtisto trema sin turnas en la kuro, ; kaj vidas per okuloj larĝegaj de teruro, ; ke staras arbarrande la Best' en halt' embuska. ;;

(×: **Venu karulo karesi ; Mian koron trafis forte fajra brulo ; Amon vi povu nur jesi ; Kaj permesi lulon de amora bor' ; Venu kara karesi min ; Al vi sopiras mia haŭto ; Venu kara karesi min ; Al vi sopiras mia haŭto.**)

Ekkrias. La Nemean Teruron li ja vidis, ; l' armitan faŭkon, kiu el sanga ĉiel' rigidis, ; la fulmajn dentojn kaj la hararon dise dornan;;

ĉar l' ombro grandigita de l' vesperruĝo brula ; faras, sub la flirtanta horora fel' Herkula, ; kun hom' miksante beston, heroon monstroforman.

(×: **Sopiras mi al kisoj, sopiras, kara ; Ho, mi vere sopiras vin ; Venu kara karesi min ; Al vi sopiras mia haŭto ; Venu kara karesi min ; Al vi sopiras mia haŭto.**)

,,&2. Romeo:

De kiam la Tentanto al la trezoro muska ; ekĉasis, esplorante laŭ la velura kruro, ; perfidis la amlukton nur silka ĉifsusuro, ; Ĝemeto via dronis en bru' de l' fest' krepuska. ;;

Fermante la genuojn kontraŭ l' rampado bruska, ; vi provis ĝin malhelpi en ĝia hasta kuro - ; vane! Okuloj viaj larĝiĝas de teruro: ; jam kaŭras kalsonrande la Man' en halt' embuska. ;;

Ekkrias vi, kaj sentas, ke, riĉa de lascivo, ; al via buŝ' sekreta sin premas fingra kiso, ; disigas la harbuklojn kaj tiklas l' etan langon;;

kaj jen tamtamas kor', ĉar, la
subtilan falangon ; jam
enlasante, glataj de ĝua
eksalivo, ; viaj virginaj lipoj
imagas ĝin peniso.

„&3. *Stimfalo:*

Kaj antaŭ li, milope, sin ĉie
birdoj ĵetis ; de l' loko, kie
venis nun la hero' marĉborde, ;
kaj flugis, kiel bruska ventega
pas', senorde, ; al lag' funebra,
kies ondaro jen plaŭdetis. ;;

Aliaj, pli basfluge, krozvojojn
nigrajn retis, ; la frunton, de
Omfala kisitan, tuŝis horde: ;
sed la triumfan sagon havante
jam surkorde, ; l' Arkist'
superba tiam tra l' kanoj paŝon
metis. ;;

Kaj nun, de l' terurita nubaj',
per lia kribro ; horora pluv'
ekpluvis kun kriĉo kaj kun
siblo, ; kiun la pafoj boris per
fulme murdaj truoj. ;;

Ĝis fine Sun' ekvidis tra tiuj
nuboj plumaj, ; kie pro lia
arko briladis breĉoj lumaj, ;
Herkulon sangan ridi al la
ĉielaj bluoj.

„&4. *Virginfalo:*

Kaj antaŭ li, milope, ha! ĉie la
ektremoj, ; elde l' humida valo
jam preta por la plugo, ;
ekkuris, kiel bruska ventega
bird-ekflugo, ; tra l' tuta korpo
vibra ĝis ŝiaj ung-ekstremoj. ;;

Ĉe l' rando defendita de l'
virgaj anatemoj ; krispiĝis la
de longe kisita orlanugo, ;
kiam, kaptante firme la
rondojn de la pugo, ; l' Arkist'
superba svingis la sagon por la
semoj. ;;

Kaj de nun la pintego, kiu
volupte fosas, ; ĉe raŭkaj ŝiaj
ĝemoj larĝigas la anfrakton, ;
el kie, fajro bona, purpuraj
gutoj rosas;;

ĝis fine ŝi eksentas, en la
boritan ŝakton, ; defie al la
mamoj, kiuj provoke sprosas, ;
la Kacon tute sangan ŝpruciĝi
blankan lakton!

„&5. *Nesso:*

Tra l' tempoj, dum mi vivis je
l' fratoj tutsimila, ; pri sort'
alie same sen tim' kaj sen
deziro, ; la tesaliajn montojn
mi estris en vagiro, ; en la
torentoj freŝaj mi banis min,
ruĝvila. ;;

Mi kreskis, granda, bela,
libera kaj sunbrila. ; Nur foje,
dum aeron sorbegis mia spiro,
; l' akra odor' de l' inaj ĉevaloj
de Epiro ; faris mian kuradon
aŭ songon maltrankvila. ;;

Sed ek ke mi l' Edzinon
triumfan povis vidi ; en brakoj
de l' arkisto Stimfala rave ridi,
; deziro harstariga min pelas
per veneno. ;;

Ĉar unu Dio - falu malben' sur
lian nomon! - ; miksis al mi,
en sango febranta de l'
ingveno, ; seksardon
virĉevalan kun am' reganta
homon.

„&6. *Nescio:*

Tra l' tempoj, dum mi vivis je
l' fratoj tutsimila ; kaj, kiel ili,
fremda al sentiment-enuo, ; la
mont' parnasa estis bonvena al
mia ŝuo ; kaj la koktelglacio
min ravis malhumila. ;;

Tia mi kreskis, bela, libera kaj
ruĝvila. ; Kaj kiam ekŝveladis
mia virsanga fluo, ; nur
samarmila lukto kaj inversebla
ĝuo ; faris mian iradon aŭ
dormon plu trankvila. ;;

Sed nun mi vidis, kiel l'
Edzino disstreĉite ; alridas la
voluptan minacon de la vergo
; kaj spasme ĝin englutas en
sukŝaŭmanta mergo. ;;

Kaj la dezir' min pelas,
hardigas monolite, ; ĉar
malbenata dio miksis en mia
spino ; kun la seksem' vircela
la amon al la ino!

„&7. *La centaŭrino:*

Travagis iam boskojn,
torentojn, rokojn, valojn ;
centaŭra ras' fiera en svarmo
nenombrebla; la sun' kun
ombro ludis sur haŭto ame
febra, ; ili en niajn blondajn
miksas la nigrajn harojn. ;;

Somer' jam vane floras. Ja
solaj, la herbarojn ; ni tretas
jam. Dezertas la grot' kun
Denso vepra; fojfoje en
noktvarmo mi eĉ ektemas,
febla, ; aŭdante voki hene de
fore virĉevalojn. ;;

Ĉar tiu tag-al-tage malpliiĝinta
grupo ; de la miraklaj idoj
naskitaj de la Nubo ; nin lasas,
kaj hominon peladas kun
amspleno. ;;

Eĉ am' ilia brute degradas nian
sinon; la kri', el ni ŝirita de ili,
estas heno, ; dezir' ilia premas
en ni nur ĉevalinon.

„&8. La retroulino:

En freŝedziĝaj tagoj de la pasinta aŭtuno ; li konis mian korpon per cent kaj cent celebroy, ; kaj liaj nigraj viloj sin miksis en amfebroy ; kun miaj ore blondaj je l' klar' de lun' aŭ suno. ;;

For la edziĝaj noktoj kaj nupta litkomuno! ; La grot' estas dezerta kun siaj krispaj veproy; kaj en mi iafoje vibriĝas tra l' vertebroy ; trem', se mi aŭdas voĉon de virginpura junoo. ;;
.....

Nun, tag' post tago, al la mildaĵoj pli inkлина, ; mi krudajn postuladojn de l' edzo kaj de l' viro ; forlasas, kaj sopiras al la kares' virina. ;;

Ĉar min bestece traktis lia karna deziro: ; nur mian pugon lia arogo celis veste ; kaj laŭ la mod' ĉevala li rajdis min de poste.

„&9. Ĉevalviroj kaj Herkulo:

La nupta svarm' sin ĵetis al festaj tabl-okupoj: ; centaŭroj, batalantoj ebriaj, ardaĵ, belaj; miksiĝis karn' heroo, en torĉobriloj helaj, ; al la arduĝaj feloj de l' filoj de la Nuboj. ;;

Ridoj, tumulto. Krio! Sub la purpur' en ruboj ; l' Edzin' malhonorata sur nigra brust' anhela ; baraktas; bronzoj tintas de hufbatad' Martela; la tablo renversiĝas inter kirliĝaj grupoj. ;;

Sed vir', ĉe kiu nanas grandulo plej impona, ; sin levas. Sur la verto faltiĝas naz' leona ; inter la stariĝantaj orharoj. Jen Herkulo. ;;

Kaj jam de unoo fino de la festa ĉambrego ; ĝis fin' alia, tiu blekanta monstra grego ; bridiĝas de l' kolera teruro de l' okulo.

„&10. Kavalerianoj kaj frokulo:

Dragonoj kaj husaroj, al festaj sof-okupoj ; la nupta svarm' sin ĵetis, ebria, arda, bela, ; kaj jam, heroo karno, ĉe l' rufa bril' kandela, ; sub la rabemaj fingroj nudiĝas la ŝvelbuboj. ;;

Ridoj, suspiroj. Krio! Sur la velur' en ruboj ; l' edzinoj ununoktaj kun blanka brust' anhela ; la taskon interrompas ĉe la vidaĵ' fabela, ; kaj tabloj renversiĝas de kirliĝantaj jupoj. ;;

Ĉar vir', ĉe kiu nanas rajdisto
plej impona, ; sin levis. El la
froko kuspita, glor' kolona ;
ekstaras en vilvepro: vere
monaĥ-herkulo! ;;

Kajn jam de unu fino de la
festa ĉambrego ; ĝis fin alia,
tuta ĵaluza ina grego ; algapas
la masivon de la Unuokulo!

.....

„&11. Fuĝo de la centaŭroj:

Ebria de ribelo kaj murdo, l'
eskadrono ; fuĝis al monto
kruta, al ŝirma grotsekreto, ;
de tim' ĵetite, sentis l' amorton
jam en preto ; kaj flaris en la
nokto odoron de leono;;

kuris tra vepro, fendoj,
torentoj, rokoŝtono, ;;
lacerton, hidron hufis en
nebridebla treto - ; kaj sur ĉiel'
altiĝis jam fore la silueto ; de
Ossa, de Olimpo kaj nigra
Peliono. ; ;

Jen, unu forkuranto de l' kruda
hordo haltas, ; kun bruska
baŭm' sin turnas, rigardas - kaj
eksaltas, ; per sola sving' sin
kroĉas al frata grego trema, ;;

vidinte, ke de l' Luno blindige,
plene brula ; longiĝas jam post
ili, fortimigil' ekstrema, ; la
hororaĵ' giganta de ombro la
Herkula.

**„&12. Promeno de
sensfraŭlinoj:**

Ebria de karesoj kaj mordoj, l'
eskadrono, ; fuĝinte el
Montmartra l' intima kabareto
; kaj laca ĉim sidi en la ĉemiza
preto, ; ekflaras ĉe l' bulvaroj
l' odoronde "ĉifono". ; ;

algapas jen al pelto, jen al
juvela ŝtono, ; trotras kiel
gazeloj en nebridebla treto - ;
kaj sur ĉiel' altiĝas jam fore la
silueto ; de l' nigra Obelisko
kaj de l' Vendom-kolono. ; ;
.....

Sed tiam le plej juna de l' ama
hordo haltas, ; kun bruska bat'
en koro rigardas - kaj eksaltas,
; al la fratin' sin kroĉas per
brako mole trema: ; ;

ĉar, viva ĉe l' memoro de ŝia
piĉo brula, ; al ŝi ankoraŭ
ŝajnas longiĝi, log' ekstrema, ;
la aspergil' giganta de tiu Frat'
herkula!

„& Artemis kaj la nimfoj:

„&13. Artemis:

Ho Ĉasistin', vi flaris per larĝa naz-ensuĉo ; l' akran odoron el la arbara jun-magio, ; kaj bruske, kun vireca kaj virga energio, ; vi ĵetas posten vian hararon: ek al buĉo! ;;

La raŭkajn leopardojn per dolorriĉa muĝo ; hurligas vi ĝisnokte en tuta Ortigio, ; kaj salte kuras inter spasmanta mort-orgio ; de l' diskrevitaj hundoj sinkantaj sur herb-ruĝo. ;;

Eĉ pli, Diino, plaĉas la skrapo de la dorno ; al vi kaj vundoj de la ungego

aŭ de l' korno, ; se jam la fero venĝis pro viaj gloraj brakoj;;

ĉar via koro volas ĝuadi la plezuron ; miksi dum viaj ludoj la senmortan purpuron ; kun hide nigra sango de l' masakritaj drakoj.

„&14 Misarte:

La cigaredo velkis, Mastrin, sur via lipo, ; ĉar vin ekkaptis l' akra odor' de l' ammagio; kaj bruske, kun vireca, malvirta energio, ; vi suprenfaldis viajn manikojn: ek al vipo! ;;

La junajn servistinojn je ĉia vest-ekipo ; vi tuj nudigas laŭ la intima liturgio; kaj jam vi dancas inter la belvida orgio ; de l' pugoĵ svingiĝantaj sub la subtila stipo. ;;

Plaĉas al vi la siblo, la hipokritaj veoj, ; la roza emocio de spasmantaj gluteoj ; kaj la parfum' ŝvebanta en tiuj lud-alarmoj;;

ĉar vian ŝvelan piĉon freŝigos la plezuro, ; nur kiam fine gutos, kiel nupta purpuro, ; ruĝetaj perloj supre de la skurĝataj ĉarmoj!

„&15 La ĉaso:

Galope la kvadrigon la virĉevaloj blankaj ; al ĉielsupro tiras, kaj ventaj varmaj ondoj ; balancas la maturon de la kamparaj blondoj. ; La Tero tute ardas de l' flamoj ĉiuflankaj. ;;

vane foliojn tendas la branĉoj jam pli lantaj; la Suno, tra la maso de l' ŝanceliĝaj frondoj ; kaj l' ombro, kie ridas arĝentsonoraj fontoj, ; englitas kaj resaltas per ludoj glimbrilantaj. ;;

Jen fajra horo, kiam tra dorn'
aŭ vojo herba, ; ĉe mortokrioj,
bojoj kaj sangoŝpruc', superba,
; urĝante en la mezo de siaj
hund-barbaroj, ;;

disflugigante sagojn de la
streĉita ŝnuro, ; flirthara kaj
anhela en la freneza kuro, ;
Artemis nevenkebla teruras la
arbarojn.

„&16. La ĉasta:

Galope knabineco forkuris,
kaj la teo ; mildigi plu ne
povas la novajn
maltrankvilojn, ; ĉar sub la
fru-maturo de ŝiaj blondaj
viloj ; al Miss jam tuta brulas
la virga perineo. ;;

vane ŝi zorge vesti per strikta
virt-livreo ; la junan korpon
kaj eĉ vizitis preĝ-azilojn: ; ŝin
vokas nehelpeble dancej', kies
bruiloj ; glitigas la homparojn
en hipokrita geo. ; ;

Jen l' arda horo, kiam laŭ
tango aŭ fokstroto ; vekante la
dezirojn per dancoritma froto,
; kaj dank' al scioplenaj,
elastaj lul-insistoj ;;

disŝprucigante ĉuron el la
streĉitaj vergoj, ; kokslerta kaj
ebria je ĉi perversaj verkoj, ;
la Miss nedeflorebla teruras la
dancistojn.

„&17. Nimfejo:

Subiras la ĉiela kvadrig', kaj
jam malkreska ; vidante l'
okcidentan marbordon, Dio
tenas ; sian kvaroblan bridon
en vana streĉ', dum henas ; kaj
baŭmas la ĉevaloj en oro
inkandeska. ;;

Plonĝas la ĉar'. La maro per
sia ĝem' majesta ; plenigas la
ĉielon, kie purpur' sin trenas, ;
kaj, hela en lazuro de l' nigra
nokt', serenas ; l' arĝenta
Falĉileto en ŝveb' silentofesta.
; ;

Jen nun deĵetas Nimfoj apud
la freŝaj lagoj ; la arkon
malstreĉitan ĉe sia uj' sen
sagoj. ; Silento. Fore cervo
beas al akvoglutito. ; ;

Super la nokta danco la brila
Lun' tepidas, ; kaj Pan',
variigante la notkadencon,
ridas, ; ke lia spir' animas la
kanojn de la fluto.

„&18. Minfeo:

La Mastro submetiĝis al rajdo
pitoreska: ; la gambojn
disiginte, sur li la dam'
ekkaŭras, ; dum ĉe la vid' de
tiaj elstaraj beloj taŭras ; kaj
baŭmas lia kaco en gloro
intumeska. ; ;

Pompas ĝi; ĉar la damo,
ŝatante ĝin plejkreska, ; per
flataj, tiklaj fingroj la ĝu-
globetojn laŭras, ; provokas al
cicado - kaj kun naiv'
bedaŭras, ; ke fulmis jam
elsputo de l' lafo inkandeska.
;;

Nun ŝi rezigne lasis por
ekdormet' kusena ; la kacon
malstreĉitan ĉe l' burso ĉuro-
sena. ; Silento. Sed jen io
revekas la min-feon: ;;

Sur la littuko blanka, pufroda
luno logas, ; kaj li, variigante
la metodojn, arogas, ; ke lia
birdo baldaŭ eknestu ĉi
nimfeon.

„&19. Pan:

Tra la vepraro, laŭ la sekretaj
pad-zigzagoj, ; kiuj perdiĝas
funde de l' verdaj malapudoj, ;
la piedkapra Dio, ĉasist' al
nimfaj nudoj, ; sin ŝovas,
ardokula, en insidemaj vagoj.
;;

Mild' ests kaŝatenti sen mov',
en mez' de l' tagoj, ; la
ĝemajn, freŝajn bruojn el foraj
akvoludoj, ; kiam la sun',
brilanta venkanto de la nuboj,
; la moviĝeman nokton
trakribras per orsagoj. ;;

Jen Nimfo vojeraras kaj
haltas. Ŝi aŭskultas: ; la larmoj
de l' mateno en ritma pluv'
paŭzutas ; sur muskon. Ŝia
koro ebrias de junsento. ;;

Sed bruske, el la nigra densej',
la Di' impetas, ; ekkaptas ŝin,
mokridon en la aeron ĵetas, ;
foriĝas. Kaj sub l' arboj,
denove la silento.

„&20 Panjo:

Tra inter la gluteoj kaj la
felkrispa garno, ; laŭ voj', kiu
perdiĝas meze de silk-sinuoj, ;
al arda am-serpento, ĉasist' al
sulkaj truoj, ; sin ŝovas,
nudakapa, en la molprema
karno. ;;

Mild' estas suprengrimpi, dum
sangoŝvela varmo, ; al freŝa
grot', el kie fontadas flu' da
ĝuoj. ; Sed en la naska ventro
l' infan' per bruskaĵoj ;
timeme sin defendas kontraŭ
la fik-alarma. ;;

Do Panjo sin ekturnas
surdorsen, kaj forpreĝas. ; ĉe
ŝia flank' seksardo en ritma
pulso streĉas ; la kacon. Ŝi
kompatas, tentate kaj
ruĝvange. ;;

kaj jen ŝi sin alklinas, karesas
per lipflatoj ; tiun cicegon
viran, ĝin lekas larĝalange, ;
eksuĉas. Kaj en buŝon tuj
svarmas etaj fratoj.

„&21. La bano de la nimfoj:

Estas sovaĝa valo ŝirmita je
Eŭkseno; kliniĝas nigra laŭro
super la larĝa fonto. ; Unu
ridema Nimfo, kroĉante sin al
frondo, ; esploras piedpinte la
fridon de l' baseno. ;;

Kaj tuj l' aliaj haste, je l' voko
de l' bukĉeno, ; kun bril' de
karno blanka kaj elŝprucad' de
ondo, ; plonĝas kaj el la
ŝaŭmo emerĝas jen
koksrondo, ; jen helaj haroj,
torso, aŭ pinta mamrubeno. ;;
.....

Dia gajec' plenigas ĉi verdan
ombroneston. ; Sed okuilpr'
fosforis en la mallum'
senmova: ; la Satirus'!
Ridbleko teruras la nudfeston;;
ili forkuras. same, se iu korv'
sinistra ; grakis, sur la rivero
senlime neĝoblova ; tuj
fortimiĝas flugo de la cignar'
Kaistra.

**„&22. La divano de la
nimfoj:**

Estas mallarĝa valo, virga je
vir-inico; Roza burĝono ŝvelas
en provokanta staro ; kaj l'
amatin', frandema je l' amara
nektaro, ; per langopinto lulas
ĉi perlon de l' delico. ;;

Por dank', inter la gambojn
fratinajn la novico ; kun hasto
ŝin egali ĉe la kareskomparo ;
plonĝas, kaj en la mikso de l'
monstre bela paro ; sur la
rivala mammo akriĝas ĉiu cico.
;;

Dia plezur' eĥigas la molan
ombroneston. ; Sed jen ampol'
fosforis en la mallum' alkova:
; la Edzo! Rideksplodo teruras
la am-beston, ;;

ĝi sin displektas. Sed li, en
spito de l' in-speco, ; sur l'
oferatajn ĉarmojn de la duop'
senmova, ; ŝtormigas ja
plenmane pluvegon da vireco.

.....)

& Jen pavo flugas al sudoriento:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 5249 paŝoj dum 58 minutoj. El ĉina tradukis Laŭlum (El Popola Ĉinio, 82/05, paĝoj 22-25). Popolkanto de la regperiodo Jian'an (196-220 p. K.) de Han-dinastio. Baladigis Martin Strid (2016) per tonoj el ĉina klasika komponaĵo samtema kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:29> (

/So LaSo MiDo LA SO LADo ReMi; Mi ReDo SOLA ReDo LA Do ReMi;

(#Rekantaĵo: do LaSo MiDo FaaLalFa MiRe DoSO LA; LA DoRelMi SoLa SoLa SolLa MilSo DolRe Mi)

)×181)+

(& Strofoj:

,& Unua parto:

'1 /Jen pavo flugas al sudoriento, ; kvin-lie* sin returnas kun ve-sento*.

(×: Sed bopatrino ŝin ri2proĉis pri kondu't. ; Li ĵuri2s: Li ne rompos ku2n ŝi2 ko2re.)

,& Dua parto:

'2 "Mi, dektrijara, blanksilkaĵojn teksis, ; kaj dekkvarjara tajlorarton regis,

'3 en aĝo dekkvinjara konghoŭ-ludis*, ; en l' jar' deksepa klasikaĵojn legis,

'4 en l' jar' deksepa prenis min sinjoro, ; kaj ofte mi malĝojas en la koro.

'5 Vi, oficisto en la prefektejo, ; laboras ĉiam ja kun devkonscio.

'6 L' edzino restas en soleco, ;
maloftas inter ni konversacio.
.....

'16 Se l' bofilin' kondutas ne
maldece. ; do kial vi ŝin
traktas nepanjece?"

'7 Sen dorm' necesa mi al la
teksilo ; jam devas iri tuj je
kokokrio.

'8 Tritage de mi pretis kvin
ŝtofpecoj, ; sed panjo min
riproĉis pri lanteco.

'9 Ne veras, ke l' teksado lante
iras, ; sed serv' en via domo
malfacilas!

'10 Por tion plenumadi mi
debilas, ; do mia plua resto ne
utilas.

'11 Nun decas peti de la
bopatrino ; eksedzinigon al mi
je la fino."

'12 Kaj sekve l' oficisto de l'
prefekto ; parolis al patrino
kun respekto:

'13 "La sort' al mi ne donis
altdestinon. ; Feliĉe mi akiris
ĉi virinon.

'14 Geedza par' fariĝis ni
volonte ; kaj restos geamikoj
eĉ transmonde*.

'15 Ni nur kunvivis ne pli ol
tri-jare, ; do tre mallonge, nur
komencofare.

,& Tria parto:

'17 Al l' oficisto diras la patrino: ; "Jen kia manko de prudento!

'18 Ne scias ĝentilecon ĉi virino, ; kaj ŝi kondutas kun liber' sen limo.

'19 Delonge indigniĝis mia koro. ; Ĉu povas mi vin lasi al la volo!

'20 Nun vivas en la orienta domo ; bona knabin' — Ĉin Lofu, ŝia nomo.

'21 Ŝi estas senkompara en beleco, ; mi svatos ŝin por via reedzeco.

'22 Do senprokraste ŝin vi jam forsendu, ; forigu ŝin — ĉi vortojn ja atentu!"

'23 Kaj diras l' oficisto de l' prefekto ; al panjo surgenue kun respekto:

'24 "Se hejmen mi l' edzinon nun resendus, ; en solo mi la morton ĝisatendus!"

'25 Aŭdinte tion la patrin' grakadas ; de kolerego kaj l' sidilon batas:

'26 "Ha, ci, knabaĉ', nun tute jam sen timo, ; aŭdacas eĉ paroli pro l' virino!

'27 Se mi jam tute perdis ŝian koron, ; mi nepre malkonsentos vian volon!"

,& Kvara parto:

'28 La oficist' nenion plue diris, ; post riverenc' en sian ĉambron iris.

'29 Li sentis kvazaŭ ŝtopon en la kolo ... ; Aŭdiĝas al l' edzin' lia alparolo:

'30 "Ne volas mi al patra dom' vin peli, ; sed la patrin' devigas min krueli.

'31 Al la patrino iru provizore; mi iros prefektejon por-labore.

'32 Ne longe poste hejmen mi revenos ; kaj certe mi denove vin alprenos.

'33 Pro tio do toleru l' mizerhoron, ; kaj metu miajn vortojn en la koron."

'34 L' edzino diras al la oficisto: ; "Finiĝu jam la malfeliĉo-listo!

'35 Antaŭe mi, en tago aŭtunfina, ; transvenis al vi, de la dom' patrina.

'36 Mi obeemis al la bopatrino. ; Ĉu mi aŭdacus agi laŭ inklino?

'37 Mi tage-nokte ĉiam diligentas, ; sed min en solo maldolĉec' turmentas.

'38 Mi pensis, ke mi estas senerara ; en servo al la bopatrino kara.

'39 Sed tamen rezultiĝis la elpelo, ; pro kio do babili pri reveno!

'40 Mi havas vatjaketon kies belaj ; brodaĵoj ĉarmas kiel floroj veraj,

'41 litvualeton kun ruĝsilka supro ; kaj aromsakoj ĉe ĉiuj anguloj,

'42 sesdek aŭ sepdek ornamaĵajn kestojn ; lititajn verde-blue per silkŝnuroj.

'43 En ili konserviĝas aĵ-kolektoj — ; diversaspecaj estas la objektoj.

'44 Modestas ili kiel la mastrino, ; ne indas al l' estonta novedzino.

'45 Do ilin uzu kiel donaceton, ; de nun ni ne plu spertos ja kuneston.

'46 Per ili konsoligu via koro, ; min ĉiam tenu en via memoro."

,& Kvina parto:

'47 Je kokokri' heliĝas jen ekstere, ; l' edzin' leviĝas, sin ornamas bele.

'48 Per jup' brodita ŝi l' aspekton ŝanĝas ; kaj ĉion kvar-kvin-foje rearanĝas.

'49 Silksuojn surpieden ŝi surmetas, ; surkape testudoŝelaĵ' briletas.

'50 Talie ĉarmas zon' el silko blanka, ; orele pendas lunoperl' senmanka.

'51 La fingroj delikatas versimile ; al ŝenoprazaj tigoj kaj l' lippara

'52 kolor' cinabre ruĝas. Ŝi gracile ; paŝetas kun beleco senkompara.

'53 Ŝi l' bopatrino adiaŭis bene, ; sed tiu ne admonis ŝin detene.

'54 "En la pasinto estis mi knabino ; vivanta en kampara kruda sino;

'55 edukon decan mi ne ricevintas, ; kaj kun sinjor' pariĝi mi ne indas.

'56 Donacojn de vi multe mi akiris, ; sed por mi l' servo al vi malfacilis.

'57 Hodiaŭ l' patran domon mi reiros,

kaj timas, ke pro pen' vi peze spiros."

'58 Ŝi adiaŭis al la bofratino, ; larmante perle kun korinklino:

'59 "Je l' tago kiam mi alvenis ĉe vi, ; fratin', vi altis nur pli ol la lito;

'60 nun estas vi en sama alt' kiel mi, ; sed baldaŭ mi fariĝos forpelito.

'61 Patrino atenteme vi prizorgu ; kaj dum irado vi ŝin helpapogu.

'62 Je l' sepa* aŭ deknaŭa* amuztago, ; memoru min dum via petolago."

'63 Eliras kaj ascendas ŝi la ĉaron, ; viŝante la larmantan okulparon.

'64 En fronto l' oficisto sur ĉevalo ; veturas, post li la edzin' en ĉaro.

,& Sesa parto:

'65 Grinc-grince kaj knar-knare l' veturilo ; alvenas stratobuŝon, kaj la viro

'66 descendas la ĉevalon, ĉaren li eniras ; kaj kun klinita kap' li flustre diras:

'67 ("Mi ĵuras: Mi ne rompos kun vi kore! ;)×

'68 Reiru hejmen nun nur provizore, ; kaj l' prefektejon iros mi ĉi-hore.

'69 Mi baldaŭ jam revenos kaj vin vidos. ; Je Dio, mi neniam vin perfidos."

'70 Al l' oficisto diras la edzino: ; "Mi dankas pro l' sincera korinklino.

'71 Se plue en la koro vi min tenos, ; mi ja esperas ke vi baldaŭ venos.

'72 Rokego firma estu vi, sinjoro, ; kaj mi fragmito mola aŭ akoro

'73 fleksebla forta kiel silkfadeno; kaj l' roko ne ŝanĝiĝos en sinteno.

'74 Mi havas fraton de la patra gento, ; tondrosimilan en temperamento.

'75 Li ne permesus agi laŭ la volo, ; sed turmentadus min per malkonsolo."

'76 Svingante manon diris adiaŭon ; la geamantoj kun bedaŭra koro.

'77 En sian patran domon ŝi revenas, ; sed ĉie malhonoro ŝin venenas.

'78 Manklakas la patrino: "Ho, subite ; revenas vi al hejmo seninvite*!

'79 Vi dektrijara lernis de mi tekson. ; en l' jar' dekkvara vi ekfaris veston,

'80 en la dekkvina vi konghoŭ-on ludis, ; en la deksepa etiketon studis,

'81 en la deksepa vin al vir' mi donis, ; pensante ke vi virtovojon konis.

'82 Se vi ne kulpus, kial sen revoko ; revenas nun vi al la hejma loko?"

'83 Honteme Lanĝi diras al patrino: ; "Senkulpa estas ja via filino."

'84 (Kaj la patrinon trafis tristoŝoko. ;)×

,& Sepa parto:

'85 Dek kelkajn tagojn post la hejmeveno, ; sendit' de l' konteestro kun svat-celo

'86 prezentas: "Lia tria fil' je belo ; ja estas senkornpara sur la tero.

'87 Nur deknaŭ-jara, tamen eminenta ; montriĝis li en arto elokventa."

'88 Patrino la filinon alparolas: ; "Respondu la svatiston, se vi volas!"

'89 Kun larmoj la filino diras jene: ; "Kiam veturis Langi hejmevene,

'90 l' oficisto diris al mi ripetfoje: ; Neniam ni disiĝu vivovoje.

'91 Se mi hodiaŭ agus lin perfide, ; ne decus ja konduti moral-spite.

'92 Prefere la senditon nun rifuzu ; kaj poste ni senhaste l' saĝon uzu."

'93 Patrin' al la svatist' pretekston levis: ; "Mizera mi filinon ĉi ricevis;

'94 Mizera mi filinon ĉi ricevis;; post nupto baldaŭ ŝi reveni devis.

'95 Se ŝi ne povis gajni l' oficistan koron, ; ĉu povus kontentigi ŝi l' sinjoron?

'96 Feliĉe vi ja povas serĉi vaste; konsenti mi ne povas jam nun haste."

,& Oka parto:

'97 De la tajŝoŭ-o*, tagojn post ĉi tio, ; alvenas la kontesekretario:

'98 "Mi diris al Tajŝoŭ', ke Lanĝi estas ; filin' el altrangula familio

'99 Kaj nun ankoraŭ lia kvina filo, ; supere bela, restas fraŭla viro.

'100 Por peti, ke mi agu kiel svatisto, ; la jenon diris al mi la skribisto:

'101 Sen ĉirkaŭfrazo diru, ke sinjoro ; tajŝoŭ-o havas filon. Kun honoro

'102 nun venas svati mi je lia nomo, ; por parenĉiĝ' kun via nobla domo."

,& Naŭa parto:

'103 Rifuze diras la patrino jene: ; "Filino mia ĵuris resti hejme;

'104 Filino mia ĵuris resti hejme; devigi ŝin ja estas nekonvene."

'105 Aŭdinte tion la pliaĝa frato ; maltrankviliĝas kore tre ĉagrene.

'106 Li ekparolas al fratino sia: ; "Decido via — kiel malracia!

'107 Al eksedzino de oficisteto ; nun eblas edziniĝ' al sinjorido;

'108 ĉielen vi leviĝos de la tero ; kaj ĉiam vivos gloire en prospero.

'109 Se vi ne volus edziniĝi al li, ; do kion volus vi estonte fari?"

,& Deka parto:

'110 Respondas Lanĝi kun levita kapo: ; "Ja pravas ĉiu via vort-silabo.

'111 Foriris mi por servi al la edzo, ; sed nun revenis al vi de vojmezo.

'112 Aranĝi fraĉjo povas laŭ la volo, ; ĉu povus mi arbitri laŭ la koro?

'113 Kvankam priĵuris mi kun la sinjoro, ; neniam estos por ni revid-horo.

'114 Do tuj vi povus jam konsenton fari ; kaj geedziĝan feston tuj prepari."

,& Dekunua parto:

'115 Leviĝas la svatisto de l' sidilo ; kun ĝojaj jesoĵ, rido kaj ĝentilo.

'116 Li al tajŝoŭ' revenas kun ĉi diro: ; "La taskon mi plenumis kun honoro

'117 kaj l' svato akceptiĝis kun favoro." ; Aŭdinte la raporton la sinjoro

'118 Tajŝoŭ-o ĝojas per la tuta koro, ; konsultas notojn en la almanako

'119 kaj librojn kaj konstatas, ke l' monato ; tre taŭgas por elekt' de edziĝdato.

'120 "Favora tago estas la trideka, ; hodiaŭ estas jam la dudeksepa;

'121 aranĝi nuptofeston vi jam povas." ; Al tualet'! Tuj homoj sin ekmovas

'122 Al tualet'! Tuj homoj sin ekmovas ; arope kiel nuboj sin glitŝovas.

'123 Jen ŝipoj nigrabirda, blankacigna — ; ĉe l' kvar anguloj pendas drakoflagoj

'124 flirtantaj en la vento, graci-signaj. ; Jen antaŭ ora ĉar' kun jadaj radoj

'125 ĉeval' blu-blanka dignas
en marŝado ; kun silkofranĝa
or-aĵura selo.

'126 Tri milionoj da donac-
moneroj ; ligitaj per silkŝnur'
kun nigrobelo.

'127 Tricent rulaĵoj da silkaĵoj
buntaj, ; frandaĵoj maraj el
lontanaj lokoj.

'128 De l' gubernia urbo jen
abundaj ; sekvantoj kvincent
marŝas — ho, homblokoj!

,& Dekdua parto:

'129 Al la filino la patrino
diris: ; "Ĵus de l' tajŝoŭ' leteron
mi akiris,

'130 ke morgaŭ oni venos vin
forpreni. ; Kial ankoraŭ vi ne
vestojn faru?

'131 Ne per saboto la aferon
baru!" ; Silentis la filino
ĉagrenplene

'132 kaj per naztuko kovris
sian buŝon — ; torenta
larmoplur' similis duŝon.

'133 Ŝi prenis sian glazur-
tabureton ; kaj l' meblon metis
antaŭ la fenestron.

'134 En la maldekstra mano,
mezuril' kaj ; tondilo, en la
dekstra mano silko.

'135 Matene ŝi broditan jupon
faris, ; vespere ŝi jaketon
elpreparis.

'136 Per la radioj lastaj l' suno
brilis, ; kun ĉagren-larmoj l'
hejmon ŝi eliris.

,& Dektria parto:

'137 Aŭdinte tiun ŝanĝon l' oficisto ; tuj forpermeson petis por reveno.

'138 Veninte al du-aŭ-tri-Lia disto* ; ekhenis la ĉevalo pro ĉagreno.

'139 L' edzino tuj rekonis ĝian henon, ; renkonte iris al ĝi sen paŝbruo.

'140 Ŝi ekrigardis foren kun ĉagreno, ; konstatis, ke alvenis la karulo.

'141 Ŝi manon levis, frapis ŝi la selon, ; dolore ĝemis kaj eldiris jenon:

'142 "Post la foriro de vi, ho, sinjoro, ; afero iras ne laŭ idealo,

'143 neatendite, kontraŭ nia volo. ; Ne informiĝis vi pri la detalo.

'144 Obei devis mi al la patrino ; kaj min devigis mia frat' je l' fino.

'145 Se ili jam promesis min forsendi, ; ankoraŭ kion povas vi atendi!"

,& Dekkvara parto:

'146 Respondis l' oficisto per ĉi tio: ; "Gratulon al vi pro la promocio!

'147 La roko estas dika, neŝanĝebla, ; ne cedas al miljara korodado;

'148 fragmito aŭ akoro estas febla, ; ŝanĝiĝas jam en unu sola tago!

'149 Vi paŝos plu en gloro kaj prospero, ; sed falos sola mi al la infero."

'150 Al l' oficisto la edzino diris: ; "Pro kio tion vi al mi babilis!

'151 Kondutis sub devigo ja ni ambaŭ, ; kiel vi estis, same ja mi ankaŭ.

'152 Ni intervidu do en la infero, ; observu ni ĉi vortojn kun fidelo!"

'153 Mansvingis ili, adiaŭon diris, ; al siaj hejmoj ili fine iris.

'154 Ĉu la ĉagrenon de disiĝ' por morto ; esprimi povus iu ajna vorto!

'155 Deziris ambaŭ iri for de l' mondo, ; anstataŭ vivi por famili-fondo.

,& Dekkvina parto:

'156 Veninte al la hejmo je la fino, ; salutis l' oficist' al la patrino:

'157 "Hodiaŭ furiozas frosta vento, ; la arboj ĉiuj estas sub turmento,

'158 (kaj l' kortajn orkideojn mordas prujno. ;)×

'159 Foriros nun mi, suno de vespero, ; kaj panjo restos sola sur ĉi tero.

'160 Decidis mi mem pri la tragedio, ; do ne blasfemu kontraŭ iu dio!

'161 Vi longe vivu kiel monto ŝtona ; kaj via sano ĉiam estu bona."

'162 Lia patrino je ekaŭd' de tio ; ekveis dum fluadis larmostrioj:

'163 "Vi estas fil' de nobla familio, ; leviĝos al kortega pozicio.

'164 Ja ne pereu nur pro la virino, ; ŝi ne egalas vin — jen la racio!

'165 En l' orienta dom', knabin' tre bona ; plej ĉarmas en la tuta urborondo.

'166 Mi sendos peti por vi ŝian manon, ; kaj baldaŭ venos al ni jam respondo."

'167 Post riverenc' la oficist' reiris ; al sia vaka ĉambro kaj suspiris,

'168 (kaj post pripenso fine li decidis. ;)×

'169 Internan ĉambrom kapon li direktis ; kaj sentis ĉiam plian korturmenton.

,& Deksesa parto:

'170 En tiu tag' ĉevaloj, bovoj
blekis — ; eniris la virin' la
bluan tendon.*

'171 Mallumo post la
vesperiĝo regis, ; meznokta
hor' estigis plensilenton.

'172 "Por mia viv' la fin' ĉi
tago estos, ; forflugos la anim',
la korpo restos."

'173 Ŝi Levis l' jupon, lasis la
silkŝuojn, ; lageten ĵetis sin,
kaŭzante bruojn.

'174 Aŭdinte l' okazajon l'
oficisto ; konsciis pri la fino
de la tristo.

'175 Sub korta arbo paŝojn li
prodigis ; kaj sudorient-branĉe
sin pendigis.

,& Deksepa parto:

'176 Interkonsentis la du-
domaj anoj ; ĉe Huaŝan*
enterigi tiun paron.

'177 Kaj verdaj pinoj, tujoj,
firmianoj* ; en tiu loko formis
nov-arbaron.

'178 La branĉoj ŝirmis unuj la
aliajn ; interplektante l'
verdajn frondojn siajn.

'179 Interne nestas amobirda
paro ; jŭanjang'* kun fideleco
senkompara.

'180 Kun kap' levita tiu par' en
ĥoro ; kantadas kune ĝis
noktmeza horo.

'181 Preterpasantoj haltas,
aŭskultadas, ; kaj penso de
vidvinoj ĉirkaŭvagas.)

< *Piednotoj*

'1 Lio = 0.5 km. Kvin-lie ĉi tie signifas "po kvin Lioj". ;
Versaĵoj pri disiĝo de geedzoj en Han-dinastio (206 a.K. - 220 p.K.) ofte estas enkondukataj per versoj pri forflugo de birdo kiel ĉi tiuj.

'3 Konghoŭ: antikva ĉina pluka instrumento.

'14 T.e, post la morto.

'62 Vespere de la sepa de la sepa monato lunkalendaro, la knabinoj en antikva Ĉinio preĝis al la feino Teksistino (Vega), ke ŝi helpu ilin lertiĝi en teksado. ; La 19-a de ĉiu monato lunkalendaro estis, en antikva Ĉinio, tago por kunveno de knabinoj por sin amuzi.

'78 En antikva Ĉinio la edzinigitaj virinoj ne povis reveni al sia patra domo sen invito de la parencoj. Tial la reveno de Langi montris

eksedziniĝon kaj surprizis ŝian patrinon.

'97 Altranga ŝtatoficisto en antikva Ĉinio administranta regionon pli grandan ol konteo.

'138 Disto = distanco.

'170 En antikva Ĉinio geedziĝa ceremonio kutime okazis en tendo el blua ŝtofo.

'176 Huaŝan (Huashan) estas fama pitoreska monto en Shaanxi-provinco.

'177 Firmiano (Firmiana simplex): speco de rapidkreska arbo kun larĝaj folioj kaj flave-verdaj floretoj en Ĉinajo kaj Japanajo.

'179 Jŭanjang-o (Aix galeniculata): migra birdo ĉiam vivanta en paro, rigardata de la ĉinoj kiel simbolo de fidela amo.>